



# **NORDHUNGARIA INFORMO**

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo  
Miskolc**

Marto-Aprilo 2009a

4. évfolyam 42 - 43. szám

<b>Printempo</b> .....	3
<b>Vörösmarty Mihály</b> .....	5
<b>LA MALJUNA CIGANO</b> .....	5
<b>Informoj</b> .....	7
Ho, la atombombon ne lasu plu.....	7
<b>Operfestivalo en Miskolc</b> .....	9
<b>Bartók+Haydn+Vieno</b> .....	9
<b>Supervivo</b> .....	11
La Sojlo .....	16
La „Molnár szikla” – La Roko de Muelisto .....	16
La plupaŝo .....	19
La peranto.....	20
<b>TĒMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO</b> .....	22
<b>PERSEKUTADO DE LA ĈEVALŜTELISTOJ</b> .....	22
Ŝercoj.....	28
<b>Amik-urbeco</b> .....	28
<b>Letero de nia leganto</b> .....	29
el.....	29
<b>Niĵnij Tagil</b> .....	29
<i>Saluton, karaj geamikoj! Bonvenon al nia urbo!</i> .....	29
<b>LA AVAŜ - MONTA PREĜEJO</b> .....	33
PARTO IIa .....	34
Informoj.....	42
Gratuloj.....	43

## Printempo



Miskolc-Popolĝardeno

Hura, jen la printempo! Alvenis la printempo! – krias multoj, jam dum marto. Laŭ la plurjarmila sperto, printempe renoviĝas la animo, spirito. La spiritfortoj etflagrantaj sub la cindro, reviviĝas, kie31 el siaj polvoj la fenikso. Reviviĝas la luktoforto.

Menciinda estas, ke niaj grandaj revolucioj, liberecbataloj eksprucis ĝenerale printempe.

*En miaj juntempoj la hungaroj festis nian:*

1848-1849-an revolucion kaj liberecbatalon kaj ties ĉefajn figurojn (Petőfi kaj Kossuth), 1919-an revolucion kaj ties Respublikon, kaj la alvenon de la 1945-a jaro, finon de la II-a Mondmilito kaj liberiĝon el teruraĵoj de la faŝismo.

En niaj nuntempoj la hungaroj restas festi nur la 1848-1849-an revolucion kaj ties simile grandajn figurojn. Inter ili ni, miŝkolcanoj rememoras ankaŭ pri **Szemere, Bertalan**

**(Bertalan Semere: 1818-1869)**, *politikisto* naskiĝis en la Borsod departamenta vilaĝo Vatta.

Li estis publikviva civito, kaj membroj de la Hungara Scienca Akademio, de la liberala nobela Opozicia Partio, poste en 1848-1849, li estis la ministro pri internaj aferoj de la kabineto Batthiány dum la revolucio kaj liberecbatalo. Li akiris grandajn meritojn en organizaferoj de la suprahungaria defendaarmerio. Post falo de la liberecbatalo kontraŭ Habsburg-reĝimo, li elmigris en Francandon kaj poste en Anglion. Li hejmenvenis en 1865. Liaj taglibroj, leteroj aperis en lia verkaro en du volumoj en 1870. **Li mortis** (antaŭ 140 jaroj) **en 1869** en Budapeŝto.

Li estis portita en Miskolc kaj entombigita sur la Avas-montan sian tombon en 1870. Super lia tombo staras grizmarmora obelisko gardante lian memoron. Lia tutfigura skulptaĵo estas verko de Róna, József. La de li kreita skulptaĵo estis inaŭgurita per la festa parolo de la miskolca poeto-notario Lévay, József, en 1898..

Statuto de Bertalan Szemere staras ekde 1906, en la Szemere-kert=Semere-ĝardeno de Miskolc.



Szemere statuo

Ĉu vi scias, ke **Reményi, Ede** *violonartisto estis* alia grava figuro de nia departamento Borsod? Li naskiĝis **en 1829**, Miskolc. En la 1848-1849a liberecbatalo li estis adjutanto de Görgey, Artur submarŝalo. Ede remenji elmigris eksterlandojn post falo de la liberecbatalo. Li donis koncertojn kaj en pasrizo, kaj en Londono. Li ricevis amnestion en 1860, post kio li hejmenvenis en 1860. Por preparigo de la miskolca skulptaĵo de la fama hungara poeto Petőfi, Sándor – li: Reményi, Ede kolektis la tutsumon de la necesa mono, el la mono ricevita de siaj parizaj violonkoncertoj. Li mortis en Nov-jorko enmane per sia violono sur koncert-podio, la **15-an de majo, en 1898**.

Ĉu vi scias, ke sinjoro **Szalai, Lajos (Ludoviko Salai)** *pentroartisto, grafikisto* naskiĝis en **1909**, la 26-an de februaro, en Őrmező? Li vivis en Usono 1960-1988. poste li hejmenvenis kaj vivis ĝis sia morto en Miskolc. Lian arton karakterizas ekspresionista-surealisma direkto kaj la simbolika bildigmaniero. Lia efiko sentblas en verkaro de pluraj hungaraj samepokaj grafikistoj.

En Miskolc, konstanta ekspozicio gardas lian memoron. **Li mortis en 1995** en Miskolc.

## Vörösmarty Mihály

### LA MALJUNA CIGANO

Prenu arĉon, vi jam trinkis por ĝi  
Ne dormetu sur la seĝ' cigano  
En piokalon nigran verŝu vinon  
Kiam zorgi apud akv' kaj pano,  
Ĉiam estis monda viv' la sama,  
Foje frostis ĝi, aŭ estis flama,  
Ludu, kiu scias, ĝis kiamo  
Kiam falos aĉe arĉ' el mano?  
Vin' en glaso kaj malĝoj' en koro  
Ek' cigan'! ne zorgu pri doloro!

Via cerbo tremu en kranio.  
Bolu sango, kiel la torento  
Astroflame la okuloj brulu  
Kriu jkord' pli akre ol noktvento  
Kaj malmole kiel hajlaj sonoj.  
Jen, pereis kampoj de la homoj.  
Ludu! Kiu scias, ĝis kiamo,  
Kiam falos aĉe arĉ' el mano?  
Vin' en glaso kaj malĝoj' en koro  
Ek' cigan'! ne zorgu pri doloro!

Lernu kanton de l' sona tempesto  
Kiu krias, ĝemas ploras, bruas,  
Arbojn ŝiras, ŝipojn subakvigas,  
Bestojn homojn, ĝi mortige skuas,  
Estas nun milit' en mondo granda  
Tremas la Di-tomb en lando sankta.  
Ludu, kiu scias, ĝis kiamo  
Kiam falos aĉe arĉ' el mano?  
Vin' en glaso kaj malĝoj' en koro  
Ek' cigan'! ne zorgu pri doloro!

Kiu ĝemis, kiu plorbruegas  
Tiu sovaĝa uraganmalhelo,  
Kiu frapas firmamenton, plore?  
Same bruas en Infer' muelo.  
Kor' rompita, aŭ anĝel' sovaĝa  
Venkintaro aŭ esper' malsaĝa?  
Ludu! Kiu scias, ĝis kiamo,  
Kiam falas aĉe arĉ' el mano?  
Vin' en glaso kaj maloj' en koro  
Ek' cigan' ne zorgu pri doloro!

Ĉu denove aŭdas ni en stepo  
Plendojn akrajn de l' praribeluloj,  
La bastonon mortigan de l' frato,  
Plorojn orfajn super la terbuloj?  
Plumfrapadon de l' volturo forta,  
La turmentojn de Promet' senmorta?  
Ludu, kiu scias ĝis kiam,  
Kiam falos aĉe arĉ' el mano?  
Vin' en glaso kaj malĝoj' en koro;  
Ek' cigan'! Ne zorgu pri doloro!

Nur sin turnu al maldolĉa suko  
Astro blinda, ĉi terura tero,  
Ĝi puriĝu en la ard' tempesta  
De l' furor' de l' peko kaj mizero,  
Kaj denove venu barko de granda  
Novan belan mondon enhavanta!  
Ludu! Kiu scias ĝis kiam  
Kiam falos aĉe arĉ' el mano?  
Vin' en glaso, kaj malĝoj' en koro,  
Ek' cigan'! Ne zorgu pri doloro!

Ludu! Tamen lasu nun la kordon,  
Estos festo iam en la mondo,  
Kiam lacos la koler' de l' battoj  
Kaj milito mortos --- en estonto,  
Tiam, ĝoje, fajre ekmuziku  
Eĉ la diojn tiam ekĝojigu,  
Tiam reekprenu violonon  
Kaj serene voku gajan sonon,  
Per la vin' de l' ĝoj' pleniĝu koro,  
Ludu kaj ne zorgu pri doloro!

Tradukis: d-ro Szilágyi, Ferenc

La belan poemon de Mikelo Vörösmarty, du eminentuloj esperantigis. Ili estis D-ro Kolomano Kalocsay kaj d-ro Francisko Szilágyi. Nun ni komunikos ĝian esperantigon de d-ro Francisko Szilágyi. Pri la poemo oni devas scii, ke post la debato de nia 1848 -1849a liberecbatalo, en la 1854-a jaro estis verkita ĉi poemo. En ĝi la aŭtoro esprimis sian esperon, sian kredon: „Estos festo iam en la mondo,...”

La originalaj libroj troviĝas en la Tutlanda Fremdlingva Biblioteko en la Kolektaĵo de Károly Fajszki:

1. La traduko de ĉi poemo de Vörösmarty, de d-ro Kálmán Kalocsay troveblas en: Eterna bukedo / [Kolomano Kalocsay].- Budapest: Literatura Mondo, 1931. - 351 p. L.sz. E 1500

2. La traduko de d-ro Kálmán Kalocsay- d-ro Ferenc Szilágyi troveblas en la: Hungara Antologio / Trad. Kálmán Kalocsay; d-ro Ferenc Szilágyi: Budapest: Corvina Kiadó, 1983. - 447 p. L.sz. E 5000

3. Traduko de d-ro Ferenc Szilágyi troveblas en la volumoi:  
Poemaro el Hungarlando / Esperantigis d-ro Ferenc Szilágyi. - Budapest: Eldono de la " Vajda János " Literatura Societo, 1929. - 95 p. L.sz. E 3430

Sendinto estis: s.rino Anna Marosvölgyi de OIK, Budapeŝto

## Informoj

### Tagoj de la finnlandaj filmoj

En urbo Miskolc, okaze de la Tagoj de la finnaj filmoj dum la 16-19. februaro 2009a, oni prezentis konkursfilmojn de la entrepreno CLNEFEST. La prezento estis bonsukcesa.

### La 8-a de Marto

Pripensu, karaj gesamideanoj, kiam ĉi revuo aperos, jam pasis la Tago de Virinoj, al kies kunlaboro, ni la geedzoj Pásztor, denove ricevis alvokon de nia japana samideanino Osioka Taeko el Hiroŝima. Kaj jes, ni sendis nian virintagan saluton al Virinoj de Hiroŝima. Nun, mi konigos ne tiun mesaĝon kun vi, sed poemon de

#### Asada Iŝiĵi

Ho, la atombombon ne lasu plu ni

Ho, forbrulis jam nia hejma urb',  
Kaj floradas nun blankaj floroj  
sur ruina ter',  
kie dormas cindroj de l' patro, patrin'.  
Ho, la atombombon ne lasu plu ni,  
Neniel la atombombon lasu plu ni  
denove sur urb' de l' patri'.

Ho, ruinas jam nia hejma mar'.  
Kaj faladas nun nigraj pluvoj  
sur la kara ŝip',  
kie regas tombe silenta malĝoj'.  
Ho, la atombombon ne lasu plu ni,  
Neniel la atombombon lasu plu ni  
denove sur mar' de l' patri'.

Ho, obtuzas jam hejma la ĉiel',  
Kaj nun kovras la nigraj nuboj  
super nia ter',  
Kie grize ombras eĉ la sunradi'.  
Ho, la atombombon ne lasu plu ni  
Neniel la atombombon lasu plu ni  
sur kara ĉiel' de l' patri'.

Ho, danĝer' nin minacas sur la ter'.  
Jam pereos labor' la tuta;  
riĉo kaj feliĉ',  
kion niaj fratoj konstruas sen ĉes'.  
Ho, la atombombon ne lasu plu ni.  
Neniel la atombombon lasu plu ni  
Denove sur ter' de la mond'.

(Laŭ la muziko de Kinoŝita Kooji)

/La poemon sendis Kozi Sajo el Japanujo al Stefano Temeŝi en Hungarion. – El libroheredaĵo de la fervojista esperantisto Stefano Temeŝi, sia filino donacis ĉi poemon al s-rino Adri Pásztor/

„La Internacia Virina Tago de UN en Hirosima ricevis sume 271 solidarecajn mesaĝojn el 69 landoj tutmonde.

Dum unu semajno antaŭ la Tago ni havis ĉe urba Centro de Virina Edukado ekspozicion de la mesaĝoj, kaj la 8an en la kunveno de la Virina Tago ĉe urba Kultura Centro saman ekspozicion kun 300 vizitantoj. En malfermo de la kunveno de la Virina Tago antaŭ 200 virinaj aktivuloj el 20 organizoj s-ino OSIOKA Taeko raportis pri la internacia interŝanĝo de la mesaĝoj per Esperanto, kaj voĉlegis kvin el la mesaĝoj. Pri la evento du avantaĝaj ĵurnaloj informis, aparte menciis pri la mesaĝoj "interŝanĝitaj per Esperanto." La aktivurinoj aplaŭdis -as laboron de ni Esperantistoj.

S-ino OSIOKA Taeko  
Vicprezidantino de komitato de la Internacia Virina Tago Hirosima  
Kontaktopersono de la komitato: [osioka@mail.goo.ne.jp](mailto:osioka@mail.goo.ne.jp)”

### **Mineralfestivalo en Miskolca Universitato, la 7-8-an de marto 2009a**

En la Minejningeneria fakultato – nun Fakultato de la Teknika Geologio de Universitato de Miskolc, estas la plej malnova teknika supergrada instruado de la mondo. Ĝi estas la inicianto kaj la organizanto de la aranĝaĵserio pri la Mineralfestivalo de Miskolc.

Pasintjare ni ĝueblis la aron de la vidaĵoj de la egzotikaj kaj lumiĝantaj mineraloj.

Ĉijare ni estis atestantoj kaj samtempe ankaŭ la partoprenantoj de la orlavo, prezentadoj de la geologiaj-mezuradoj kaj agadmetodaj teknikoj.

El la ĉizitaj kaj malaj eksterordinaraj mineraloj kaj duonjuvelŝtonoj oni povas aĉeti de la kolektantoj. Krom la vidaĵeblecoj de la 27a Mineralfestivalo, ties programon riĉogis ankaŭ la mineralborso kaj la diversaj prelegoj per diapozitivaj lumbild-prezentadoj.

Adri s-rino Pásztor



Mineralfestivalo de Miskolc

### **Operfestivalo en Miskolc Bartók+Haydn+Vieno**

En la programon la organizantoj elektis el verkoj de tiuj komponistoj kiuj rilatas al Vieno. Tiuj tie naskiĝis, vivis aŭ mortis, sed el vidpunkto de sia viv-verkaro tiu urbo havis grandan rolon. Okaze de la 200. datreveno de morto de la granda aŭstra komponisto Joseph Haydn (1732-1809), oni elektadis – por la programo – el inter lia verkaro, sed dum la ĉijara operfestivalo: rolon ricevos ankaŭ liaj samepokanoj: Ludwig van Beethoven (1770-1827) kaj Wolfgang, Amadeus Mozart (1756-1791).

El inter la samepokaj muzikverkistoj de la hungara Béla Bartók (1881-1945), eksonos komponaĵoj de Arnold Schönberg (1874-1951) kaj Alban Berg (1885-1935).

La granda publiko rigardos kaj aŭdos 14 operojn, 21 koncertojn, 3 baletojn, 11 porinfanajn verkojn kaj 18 ceterajn produkciojn en la ĉefa programo de la ĉijara operfestivalo inter 10 kaj 21a de junio.

(La hungarlingva informo devenas el la nro7a de jarkolekto 9a: de la Miŝkolca semajn-gazeto MINAP, esperantigis Adri Pásztor)

### **La mondfama muzikisto**

Dum iu januara mateno iu homo haltis en metroostacio de Vaŝingtono kaj komencis violoni. Li prezentis ses muzikaĵojn de Bach sume dum kvardekkvin minutoj. Dum tiu tempodaŭro pli ol mil homoj estis en la stacio, grandparto de la homoj klopodis iri al sia laborejo ddum la trafikkulmino. Post tri minutoj iu mezaĝulo rimarkis la muzikiston. Li malrapidigis, haltis momenton, post rapidis plu. Post unu minuto la violonisto ricevis lian unuan unudolaron, kiun iu virino ĵetis en la violonigon., senhalte. Post kelkaj minutoj iu komencis aŭskulti la muzikon apogadante al la muro, sed ne delonge rigardis sian horloĝon kaj rapidis plu.

Pleje iu tri jara knabeto atentis la muzikon. Sia panjo kondukis lin je la mano, sed la knabeto ekhaltis por rigardi la violoniston. Ne delonge la panjo tiris plu lin, sed la knabeto dum tio malantaŭen gvatadis. Ankaŭ aliaj infanoj faris same, sed ĉiuj gepatroj kondukis ilin je la mano.

Dum la kvardekkvin minuta prezentado nur ses homoj ekhaltis por aŭskulti la muzikon. Ĉirkaŭe 20 homoj donis monon sen malrapidigo. 32 dolaroj kolektiĝis. Kiam la muziko finiĝis kaj iĝis silento en la stacio, tiam neniu rimarkis la ŝanĝon. Neniu aplaudis, neniu gratulis.

La piedirantoj ne sciis, ke unu el la plej fama violonartisto, Joshua Bell violonis la plej malfacilajn muzikaĵojn de la muzikhistorio. Kosto de lia Stradivari-violono estas 3,5 milionoj da dolaroj. Li violonis antaŭ la menciita prezentado du tagoj en iu teatro de Boston antaŭ plena teatro, kie kostoj de la enirbiletoj estis averaĝe cent dolaroj.

Ĉi tiu estas vera historio! Joshua Bell violonis inkognite en la metroostacio, kiun la ĵurnalo Washington Post organizis kiel sociologia eksperimento. Oni esploris tion: Ĉu ni rimarkas dum labortagoj, dum ne taŭga tempopunkto la belecon, ĉu taksas la talenton dum neatendita situacio.

Iu ebla konkludo de rezulto de la eksperimento estas: se ni ne havas tempon por aŭskulti la violonludon de la unu el la plej talenta muzikisto de la mondo, kiu violonas la plej vituozajn muzikaĵojn de la muzikhistorio, tiam ĉu ni estas pri ĉio seninteresaj ĉiutage?

Vidu propraokule:

<http://www.youtube.com/watch?v=hnOPuOYWhw>

(Informon de Johano Sibinger sendis s-rino Várhelyi el Tokaj, esperantigis László Pásztor)

### **Inaŭguro de memortabulo en Eger**

La urba Esperanto Klubo „Verda Stelo” de Eger kaj la Urba Komuna Domo „Bartakovics Béla” inaŭguris memortabulon, je honoro de la unua hungara esperantisto, universitata profesoro d-ro BÁLINT Gábor (Gabrielo Bálint), okaze de la 165-a datreveno de lia naskiĝtago.

D-ro Gabrielo Bálint naskiĝis la 13-an de marto 1844 en Szentkátolna kaj mortis la 25-an de majo 1913 en Temesvár (elp.: temŝvaar, nun Timișoara en Rumanio). Li estis universitata profesoro en urbo Kolozsvár (elp.: kolozŝvar, nun Cluj -Napoca en Rumanio), kaj fake okupiĝis pri la lingvofamilioj de la regiono Ural-Altaj. Li parolis 21 lingvojn. En 1897 li organizis esperanto-lingvokurson por studentoj de Universitato de Kolozsvár. Li iniciatis kaj subtenis la eldonon de la unua hungara-Esperanto gramatiko.

La inaŭguran parolon diris Jozefo Eszényi - estrarano de Hungaria Esperanto-Asocio -, en ĉeesto de G. Nagy Robert, kreanto de la memortabulo el Dombóvár.

Por la memortabulo oni trovis lokon sur la unua eta la Komunuma Domo „Béla Bartakovics”.

La inaŭguro okazis la 13-an de marto 2009, vendredon, la 17-an horon.

Je komenco de la inaŭgura -ceremonio, ni staris unu minuton tutsilente por piete rememori la eksan klubsekretarion s-ron Farkas László, kiu laboris 30 jarojn por esperanto kaj mortis antaŭ nelonge. Lia forpaso estas dolora perdo por ni: hungaraj geesperantistoj.

La aranĝaĵon honorigis per siaj aperoj: la vicurbestro de urbo Eger, s-ro Szeleczi János, la estrino de la Komuna Domo, s-rino Somody, Jámbor Ildikó : kiel kultura magistrino kaj ĵurnalistino, plie raportisto de la tagĵurnalo de departemento Heves Krome aperis tie, kaj: s-ro Nagy János, kiel estrarano de la Nordhungaria Esperanto Fonda la HEA, geedzoj Pásztor, reprezentantoj de la skolca Esperanto -Amika Rondo „Király Lajos” kaj kelkaj membroj de la urba Esperanto Klubo „Verda Stelo” de Eger

Tre bedaŭrinda estis, ke el tiu 65 membra esperantista grupo nur ses samideanoj partoprenis ĉi gravan okazintaĵon, kie kune kun la gastoj, la samurbanoj estis entute 15 personoj. Ni tre bedaŭris ankaŭ tiun, ke ne partoprenis esperantistoj el la rumaniaj urboj Cluj kaj Timișoara.

La honora klubestro s-ro Könczöl Ernő (kiu estis nia samklubano en Miskolcĝis 1980, en la „Ora Duopo Kalocsay-Baghy” Esperanto Klubo). S-ro Barta Zoltán kaj la aliaj organizantoj faris la rememoron tre agrabla. La festa programo estis emociiga, la etoso estis familia. Nia konversacio kun laĉeestantaj membroj de la gastiganta esperanto -klubo estis tiome agrabla, ke ni tre bedaŭris forlasi ilin kiam ni devis adiaŭi pro nia hejmenvojaĝo.

László Pásztor



Inaŭguro

**Adri Pásztor**

**Supervivo**

Dum historio de la homaro multfoje okazis amase krizoj, tre malfacilaj periodoj. La homoj ne havis nutraĵojn, hejmojn, kontaktojn, ekzekutitaj estis pro realaj aŭ ne justaj pravoj. En tiuj periodoj multoj falis, pereis. Rezignis ili kaj mortis.

Tamen, restis espero ĉiam, estis la volo de ago, la vera ago por akiri la bonon, kaj agi por la ĉiumaniera klopodo por la vivo, akiro de la supervivo en intereso de la estonto.

Pri tiuj pensante nun en tempo de la nova ekonomia krizo, venis mian kapon la rememoro pri etapo tia de nia familio. Ankaŭ mia familio havis tiun, kiam mi estis malgranda infano. Ankaŭ miaj gepatroj devis lukti por nia vivo. Sed por ni ne estas permesata forgesi pri tiuj, kiuj helpis nin bonkore. Per ilia helpo kaj niaj klopodoj ni povis supervivi niajn malfacilaĵojn.

Mi petas vin, nun bonvolu legi pri ties historio.

Adri, s-rino Pásztor

## Adri Pásztor Supervivo

Mi, - kiel heroldino de la printempo, per la unua pli varma vento degelanta la neĝon - alvenis ĉi mondon, la 31-an de marto 1943a, en urbo Kassa. Nuntempe tiu - ĉi loko havas la nonmon Košice, kaj estas ĉefurbo de Orienta Slovakio sed tiutempe ĝi apartenis al Hungario. Mia patro devenis el familio havanta germanan (ŝvaban), italan, slovakajn kaj hungaran radikojn. Li estis juĝisto, vicprezidanto de la tiea Regiona Juĝejo. Li parolis naŭ lingvojn krom la Esperanto.

Mia patrino (instruistino de popolaj kaj sinjorbredaĵoj) devenis el tiu familio, kiu havis kaj slovakajn kaj hungarajn radikojn.

Mi naskiĝis dum la furiozanta dua mondmilito, sed kelkaj jam opiniis la gajan aŭroron de la sekva pli bona epoko, kaj ili ĝojis, ke la homaro tamen sukcesis transvivi ankaŭ la teruraĵojn de tiu epoko.

La 28-an de februaro 1945a estis la decidita limdato, ĝis kiam la urba loĝantaro devis deklariĝi per enketilo, al la urba estraro; al kiu nacio apartenanta sentas sin. Ĉu ili opinias aparteni al la : slovakoj, germanoj, hungaroj, ĉeĥoj, poloj aŭ rusenoj? Neniu konis la celon kaj la kialon de tiu deklardevigo. Nur la politikistoj sciis, ke tiam establiĝis la pli posta ŝtato: Ĉeĥoslovakio.

Miaj gepatroj substrekis sur la listo, la vorton hungara, poste ili poŝtigis ĝin al la urba estraro. Sekvontage, la 1-an de marto en 1945, frumatene je la 5-a horo soldatoj vekis nin per kolbo frapategante nian pordon. Ili ordonis, ke ni tuj sinvestu, kunpaku la oficialajn personajn kaj la niafamiliajn dokumentojn, por tri tagoj malvarman manĝaĵon por ni tri, ke tiuj forportebaj estu. Ili informis nin, ke ni rajtas forporti kun ni nenion alian. Nu, ĉio okazis laŭ la ordonoj, ĉar tiam milito estis kaj ne estis konsilinda kontraŭstari al la soldatoj. Nian loĝeĵŝlosilon la ĉefoficiro prenis al si mem kaj post nia foriro li stampis la enirejon de nia apartamento. Miaj gepatroj ne sciis, kien ni devas iri, kial ni devis forlasi nian hejmon, kiun sorton ni havos. Ili, tre timegis ĉar havis jam informojn pri la pli frue kunkolektitaj judoj kaj pri ilia sorto Holokaŭsto. Kontraŭ tiu fakto ke ni ne estis judoj, la necerteco estis paraliza. Miaj gepatroj antaŭpuŝante min en la infanĉaro kune kun la pakaĵoj, en la freŝe falinta neĝo povis sinmovi tre malrapide. La soldatoj ofte instigadis ilin: antaŭen, antaŭen. Ili devis rapide forigi nin, por kiam tutheliĝas, ni estu balailitaj el la urbo, por ne estigi panikon inter la loĝantaro. Ekster la urbo, kien la soldatoj akompanis nin, ni renkontiĝis kun tiuj familioj, kiuj samtiel deklaris kiel ni. Kiam jam neniu mankis de inter ni, la soldatoj ordonis, ke ni ekiru hejmen en Hungaron. Miaj gepatroj malŝarĝiĝis pro sia timego kontraŭ ilia doloro perdi sian hejmon, eĉ ĝojis por sia restanta vivo. Ili ne sciis, ke en Hungario samtempe similaj eventoj okazis, sed rilate la slovakdevenajn familiojn. Tiel laboris tiam la granda politiko!

Nu, nia grupo perpiede vojaĝis en neĝa pluvego dum tri tagoj, de la tiam slovakiginta Kassa tra la neĝkovritaj kampoj, valoj, kaj finlaciĝinte atingis la unuan hungaran limproksiman grandvilaĝon Szikszó / Sikso/. Tie, la vilaĝa estraro lokigis inter la tiean loĝantaron la kompatindstatajn forpeltajn senhavajn -homojn kun la multaj infanoj, por helpi ilin. La vilaĝestraro ordonis doni al ili varman tranoktejon, sekajn vestaĵojn, nutraĵojn. Tiu vilaĝo / nun jam urbo / estas je 25 kilometra distanco de urbo Miskolc. Miaj gepatroj volis post ioma ripozo plumarŝi en Miŝkolcon al siaj tieaj parencoj. Inter la tiamaj militaj cirkonstancoj la fervoja trafiko ne funkciis por la vojaĝantoj, nur soldatojn portantaj ŝarĝvagonaroj trafikis sur la restintaj kelkaj relparoj. Aŭdiĝis diversaj historioj pri la prirabado de la perpiede vojaĝantoj. La vilaĝestraro ne konsilis la perpiedan pluiron en Miŝkolcon kune kun mi: la eta, sur brako sidanta infano. Do, mia familio restis en la nin bonkore akceptanta vilaĝo, de nia tienalveno ĝis oktobro de 1947a.

Maljuna, vidviniĝinta apotekistino (onjo Ilona, sinjorino Rimai) donis al ni loĝejon sur parcelo de sia propra domo. Sur la parcelo lima kun la apuda banko, staris la loĝdomo, kiun akacio arba, siringo arbeda, parko ĉirkaŭis kun samjaraj kaj plurjaraj floroj. Malantaŭ ĝi staris nia estonta hejmo kaj malantaŭ tio legomĝardeno situis. La hejmanoj en nia dometo konservis la ĝardenajn terkulturilojn, sed antaŭe la ĝardenisto loĝis en ĝi. En la flora parko japana pavilono staris, farite el skulptita ligno. Hejmon de onjo Ilonka konservis la ĉefa konstruaĵo apudstrata. De la domtegmento la pluvakvon kondukis defluilo malsupren, kiu figuris drako-kapon tutsupre. Feliĉe, la por nia loĝejo ricevita konstruaĵo estis seka, brikmura, kaj hejtebla. La vilaĝa kuracisto (d-ro Deziderio Komjáthy) kun familianoj portis tien malnovajn, neuzitajn meblojn, littotolaĵojn, kuirpotojn, nutraĵojn kaj ĉion necesajn, kion ni bezonis al nia vivkomenco tiea.

Bedaŭrinde mia patro ricevis al sia profesio konvenan laboron nenie. Sed ni bezonis monon por la pluvivo, ke ni ne devu petegi, kaj akcepti ĉion senpage de la donacema, sed simile tre malriĉa loĝantaro. Do, kion fari? Mia patro anonciĝis en la setlejo pere de la estraro, ke li entreprenas lingvoinstruon por mono. Neniu anonciĝis eluzi tiun ŝancon. Tiam la homoj timis lerni iun ajn lingvon. Mia patro iris al la vilaĝanoj por ili necesajn laborojn fari: arbon haki, terkulturi, kaprojn kaj bovinojn nutri, stalojn purigi, sterkojn porti eksteren al la agrikulturaj teritorioj de la mastrumantoj, ks. En sia libertempo el salikvergoj li plektis seĝojn, korbojn. De la maizobastoj / el la ekstera kovraĵmaterialo de la maizfruktoj / li trikis : ĉapelojn kontraŭ la sunbrilego, pantoflojn el malnovaj forĵetitaj virĉapeloj, planktapiŝojn, korbojn por la ovoj kaj agroproduktaĵoj. El maljunaj sed ne putriĝintaj arbotrunkoj li skulptis diversajn loĝejornamojn - kaj uzobjektojn. Poste ilin li forvendis al la vilaĝanoj. Ĉiu aĉetis de li, sed neniu donis monon. Ĉiu donis, kion povis. Ekzemple ni ricevis: brulmaterialon, grasajn, oleon el sunflorsemoj, rizon, terpomon, lakton farunaĵojn el tritiko kaj el maizo. El tiuj lastaj mia patrino bakis panon kaj kukojn, aŭ faris kaĉon ks. Nia domposedantino donacis ankaŭ grensemojn kaj proponis terkulturi sian legomejon dum la sekvaj jaroj. Ŝi proponis, ke el la pretaj produktaĵoj unu parto estu ŝia, unu parto estu forvendata por mono kio estu dividata inter ŝi kaj ni, kaj la lastaj du partoj restu la nia. Tiu estu de ŝi la pago por laboro de miaj gepatroj.

Tiel alvenis nia unua kristnasko en la amika vilaĝo Szikszó. Ni havis nek kristnaskarbon, nek viandan manĝaĵon surtable. Sed, la domposedantino invitis nin kune kun ŝi festi la „Sanktan Vesperon”, la naskiĝtagon de Jesuo. Helena, la maljuna onjo metis vastajn, molajn kusenojn sur la benkojn de la japana pavilono. Kaj miajn gepatrojn kaj min ŝi vestigis en foruzitajn peltojokojn, ke ni ne sentu la malvarmon sub la forte brilantajn stelojn havanta vintra ĉielo. En la paca lunlumo ili bakis lardon, poste manĝis ĝin per mola blanka pano. Dum la vinsupo-sorbado (farita la vinsupo de Onjo Helena el ova, per cinamo spicigita kuirita blanka vino) ili gaje babiladis. Mi, la etinfano ĵusbakitan per sekvinberoj plenan migdalan laktokukon ricevis kun varma laktigita ĉokolado. Onjo Helena zorgis pri ĉio. En la mallumo la krakado de la fajro, la ĉion traefika amo, la nin gardantaj drakoj, la ĝis tiam nekonataj delikataĵoj tute sorĉis min.

En oktobro de la 1947-a jaro mia patro laboron ricevis en la Miskolc-Regiona Juĝejo. Fine, li povis praktiki sian juĝistan profesion. Do, ni forlasis mian feinlandon kaj translokiĝis en urbon Miskolc.

Ni havis parencojn tie. Do ni ne vivis jam for de mia patrino avino kaj baptopatrino familio.

La domo, en kiun ni translokiĝis, estis en sufiĉe bona stato. En la sama korto du loĝejoj estis, sed tiuj iam apartenis al unu familio. La alian loĝejon luanta familio mastrumadis. Ili terkulturis, tenis gebovojn, geĉevalojn, havis hundon, katon, kuniklojn, porkojn, gekokaron. Mi tre kontentis pro ili, ĉar pli frue mi ne vidis tiom multspeciajn dombestojn. Kaj por mi ilia ĉaro per kio ili portis la plugilon, kaj la terajn produktaĵojn, mem estis la vera interesajo.

En nia strato je nia ekloĝo oni forigis jam pro la dummilitaj bombadoj –sur la straton falintajn domruinojn. Sed, irante sur la strato mi povis rigardi, la multajn domojn difektite pro damaĝaj eventoj de la dua mondmilito.

La lasta difektigo tiam okazis, kiam dum la tn. „tapiŝbombado” la familidomojn –situantajn de la fervojlinio 50-100 metra distanco- la germanoj bombadis, kiam ili ekkomencis la retiriĝon. Ankaŭ la lernejo tute ruiniĝis. Ĝi ne havis muron nedifektitan. Sed, oni ekkomencis ties rekonstruon en 1947. Mi iris tien ĉiutage. Unue oni forigis la ruinojn, poste komencis konstrui la novan konstruaĵon. Mi ŝatis rigardi la murleviĝon. Multaj homoj laboris senlace, ke la lernejo estu denove hejmo de la kulturo. Iu maljuna masonisto permesis al mi, ke ankaŭ mi metu brikojn en la brikvicojn de la rapide leviĝantaj muroj. Poste, kiam la lernejo estis jam komplete pretigita, mi rakontis ĝoje al ĉiu, ke ankaŭ mi konstruis la lernejon.

Hejme, ĉiuvespere ni devis senlumigi per kovriloj la fenestrojn tiel, ke neniom da lumo povu trafiltiĝi eksteren. La klarigon de la kialo poste ankaŭ mi ekkomprenis. Miaj gepatroj tial devis tiel agi, ke iu vojerara fusilgrenado ne rompu la fenestrovitrojn kaj la vitropecoj ne povu vundi nin se ni estus en fenestro-proksimeco. Tiutempe pro la malfacilaj vivcirkonstancoj multaj homoj rabis la fervojojn. Ili rabis ĉion moveblan; maŝinojn, ferpecojn, relojn, poste vendis, por ke el la tielmaniere gajnita mono povu aĉeti nutraĵon por siaj familianoj. Ilin persekutis la policistoj kaj soldatoj. Se estis kiuj ne haltis je la alvoko, sed plukuris, la gardistoj, soldatoj ofte eĉ pafis post tiuj.

Sed, poste ne trankviliĝo sekvis, sed novaj streĉiĝoj, nova nervomuela etapo sekvis. La policistoj de la tiama estro de la Hungara Komunista Partio Mátyás Rákosi /Matiaso Rakoŝi/, per oftaj demandadoj afliktis mian patron, kiu devenis –el grandnobela terbienon hava, sed je fino de la 19-a jarcento malriĉiĝanta, malgrandan terposedaĵon terkulturanta familio. Kaj fine ankaŭ tiun havaĵon perdis ili, ĉar alte kostis la instruo de iliaj infanoj. Mia patro, kiel ilia ido apartenis tiutempe al tiu tavolo de la popolo, kiun la tiama Komunista Partio persekutis. Feliĉe, la juĝeja estraro protektis nin. Ni povis vere danki tiun agon, ĉar tielmaniere ni estis savitaj kontraŭ la puna deportado en la ebenaĵon Hortobágy, kiel de la laborista klaso fremdaj homoj. Tiuj klasfremduloj estis la antaŭmilitaj oficiraj kaj noblaj familioj eĉ tiuj, kiujn pro io la registaro pensis riĉuloj, aŭ se iu iun denunciis pro io. Tiam, kiam kondukis homo kiel vulpo al homo, regis timo inter la loĝantaro.

Inter tiuj situacioj rapide alvenis la Kristnasko de la 1947-a jaro.

Mia patro tiam jam laboris ekde tri monatoj. Mia familio havis malmultan propran ŝparmonon. Posttagmeze proksime al vespero, la 24-an de decembro mia patro kaj patrino sendis min promenadi ĝis la sekva strato.. Ili proponis al mi, serĉi la Jesueton. Dum mia foresto ili volis ornamati la kristnaskan piceon kaj meti la donacojn sub ĝiaj branĉojn. Ili ankaŭ tion proponis al mi, ke renkontiĝante kun Jesueto, mi petu lin por veni kaj porti donacojn ankaŭ al ni, ĉar ankaŭ ni estas bonaj. Dum mia promeno la neĝa pluvo ekfalas. Kun Jesueto mi ne renkontiĝis, sed multloke tra la ne malkovritaj lumigitaj fenestroj enrigardante mi ekrigardis la ornamitajn kristnaskarbojn. Ĝis genuoj kota mi iĝis. Miaj vestaĵoj tramalsekiĝis je kiam mi hejmenatingis. Hejme mi raportis al mia patrino, ke eble Jesuo kaj mi preterlasis unu la alian, ĉar mi ne sukcesis renkontiĝi kun li. Tamen mi vidis multloke, ke li vizitis jam multajn infanojn, ĉar mi vidis kristnaskarbojn multloke. Mia patrino ridete devestigis min el la traelsekiĝintaj jaketo kaj robo, poste unue bone lavis min, kaj pli poste vestigis min en novan varman robon.

Poste, miraklo okazis! Ho, Dio mia, kian grandan surprizon mi havis!

La ĉambropordo malfermiĝis malrapide, festene, kaj mi povis enrigardi la ĉambron. Ene agrable varma estis. La forno zumis. Proksime de la fenestro kristnaskarbo staris, preskaŭ tiel alta kiel mi estis. Sonorileto sonis. Sur la branĉoj de piceo arbo brulis koloraj kandeletoj, pendis kristnaskaj bombonoj kaj koloraj vitrogloboj. La kristnaskaj bonbonoj proponis sin al mi: Ek! - prenu, prenu trankvile el mi! Belega estis la vidaĵo. Post

multaj jaroj mi eksciis, ke tiujn kristnaskajn bombonojn mi patrino pretigis dum la antaŭa nokto el sukero, butero, muelita juglando kaj aldono de akvo pere de ilia kunfando. Ilian kovrilon mia patro tranĉadis al la necesa mezuro, el molaj silkapaperpecoj, kiujn ili kolektis okaze de panaĉetoj aldonitaj paperpecoj. La sukeraĵo ne sufiĉis, ne ricevis ĉiu el ili. En la pliaj paperoj estis troveblaj etaj pecoj da ligno kaj karbo.

Ankaŭ min trabrakume staris miaj gepatroj antaŭ la arbo, kaj ni dankon donis al filo de Dio, kiu helpis nin travivi la malfeliĉaĵojn, ke ni povu ekvivi ĉi tiun belan tagon. Jen, ni staris en nia propra familia hejmo kune, ĝoje. Ni estis tre malriĉaj tiam, sed nia estis la promeso de la pli ĝoja estonto, la espero de pliboniĝo de niaj vivcirkonstancoj. Inter la mebloj -kaj uzobjektoj ricevitaj ankoraŭ en la amika setlejo Szikszó, ni sentis nin feliĉaj..

Post nia preĝo mi ekvidis la por mi donace ricevitajn lud-urseton kaj fabel - libron pri Neĝulineto kaj la sep nanoj. Mi plue serĉis donacojn, sed vane. Mi trovis donacojn por miaj gepatroj nenie. Je mia mira demando ili tion respondis al mi, ke ankaŭ ili ricevis donacojn de Jesuo, eĉ ili ricevis la plej grandajn: unu la alian, min kaj la pliboniĝon de nia vivo.

Ankaŭ mi volis ricevi mian parton el ilia ĝojplena rideto kaj interbrakumo. Tial mi portis skabelon apud ilin. Mi staris sur ĝin kaj trabrakumis miajn gepatrojn. La „Sankta-vespera” festa manĝaĵo por ni ĉiuj: varma laktosupo kaj per sekvinberoj plena novbakita rompitaĵo migdalpecojn enhavanta -lakta kuko estis, kiel antaŭe en Szikszó. La dolĉan kukon mia patrino bakis, similan, kiun bakis onjo Helena. Ni dankodone rememoris ankaŭ pri la nin helpantoj dum nia vivo en Szikszó.

Laodoro de la vanilherba sukero sur la kuko, la sorĉo de la kristnaska ĝojo tute plenigis kaj baldaŭ lulis min en profundan songon. Kaj dume ekstere mallaŭte denove ekfalas la grandaj neĝeroj, pro kiuj je mateno la neĝo atingis ĝis miaj genuoj.

(Verkita en originala esperanto, la 26-an de decembro 2006a)



Szikszó, Romkatolika preĝejo

## Adri Pásztor

### La Sojlo

Tiuj, kiuj sukcesis jam travivi teruraĵojn, scias, kiome malfacila estas tiu provo por resti vivanta. Ili ĉiuj scias, ke la provoj ofte restas senrezultaj, se la provantuloj ne havas la necesan helpanton en la bezonata tempo. Pro ties manko la kompatindulo/kompatindulino povas tute senesperigi. Tiu homo pensas, kel li/ŝi estas sola en la mondo, kiun neniu povas kompreni, tial la solvo de la problemoj devas esti nur la sia. Pensas tiu homo, kel li/ŝi jam ne povas vivi sammaniere, jam ne estas celo por kiu vivi kaj pro kio. Ne estas jam vivcelo... ili sentas, ĉi situacion kiel sojlon inter du elekteblaj statoj. Ili pensas se trapaŝos tiun sojlon, surtere restos ĉiuj suferadoj, kaj transe atendas ilin nur la ĝojo, paco, trankvilo, la eterna ripozo. Tie, en la transmondo nenio doloros plu, ili havos jam nenian vivproblemon. Por tiu pensado povas kaŭzon doni nekalkuleblaj ekzemploj: eblas inter ili malsano, neatendita malboniĝo de amrilatoj en la familio, malboniĝo de financa stato de la homoj, politikaj kaŭzoj, perdo de la anima ekvilibro pro perdo de la konstantecon donantaj fideluloj, edzo, gepatroj, infano, laborejo, aŭ aliaj ceteraj aferoj. Ĉi solvomaniero de la regantaj vivproblemoj estas tre malfacilaj. Estas individuoj kiuj ektimiĝas de tio. Tiuj entreprenas tamen la vivon kaj provas solvi sian problemon alimane aŭ tamen petas eksteran helpon al tio. Sed ĉiam estas homoj, kiuj tamen elektas ĉi solvon de iliaj vivproblemoj, nevidante alian vojon eksteren. Sur la arbara teritorio de Miskolc estas trovebla la bela, sed tre danĝera ekskursejo:



Ĉirkaŭaĵo de la Roko Molnár, en marto

### La „Molnár szikla” – La Roko de Muelisto

Ankaŭ ĉi tiu loko troveblas en la montaro Bükk, kiu estas parto de la Norda – Mezmontaro de Hungario.

La Norda Mezmontaro estiĝis dum la terhistoria mezepoko, en ties periodoj Juro-Permo, kaj Karbono. La unua pli detala pristudo de la montaro Bükk, okazis pere de la Viena Geologia Instituto, en kadro de plenumo de ties „Nordhungaria-karpata 144 000a kartografia programo”. Sed ĝis nun ĉi tiun esploron sekvis multspecifaj esploroj: je konstatoj de ties intertavola konsisto, aĝo. Nia lando havas malmulte da tiuj montoj, kiujn ne zonintus tiom da

necerteco koncerne la demandoj pri ĝia geologia konsisto, ol de la montaro Bükk. La geologiaj esploroj daŭras ankaŭ nuntempe. Oni konstatis, ke la geologia konsisto de la montaro Bükk estas tre multspecifa. Ekzistas tie ekzemple: fajne tavoloita blanka kalkŝtonroka Bükkmontara altebenejo, sed troveblas ankaŭ dolomitaj lokoj, eĉ estas malofte ankaŭ malhelgrizaj-helgrizaj kalkŝtonrokoj, vulkana tofo, eĉ ankaŭ dolĉaakva-tofo. Ekzistas eĉ ankaŭ du romplinioj, en kiuj enfluis diversaj mineraloj, kiuj poste tien enkristaliĝis. Tiuj estis la diabazo kaj la porfiro. Sed, mi povus longe vicigi al vi pri la ankaŭ okulojn ĝuigaj mineraloj kaj ties aperlokoj. Ĉiujn-tiujn enhavas la Nacia-Parko de Bükk. Pri ĝi ni rakontos pli poste.

Do, aperas en la montaro Bükk ankaŭ krudflankaj blankmuraj kalkŝtonrokoj, kiujn ĉirkaŭas ŝtonfluejaj montoflankoj. La dispeceterigado de la rokoj daŭras ekde ilia kreiĝo. En la lasta glaciepoko ĉi dispecetiĝa procezo pli malrapidiĝis pro la pograda surarbariĝo de montaro Bükk, sed ĉi procezo progresas ankoraŭ ankaŭ nun, sed per pli malgranda inteseo.

Ja, ankaŭ niatage daŭras ĉi procezoj pro la abunde produktiĝantaj CO<sub>2</sub> (kalkdioksido) kaj humoacidoj en la brunaj kaj po loke estantaj nigraj arbogrundoj (rendzinoj), ruĝaj-argilaj restaĵgrundoj sub la riĉe subkreskaĵaj kverkoarborejoj.

(Pri tiuj mi akiris informojn el la eldonitaj faklibroj de la Biblioteko estanta ĝi en la Miskolca-Universitato, de la Minerala- kaj Geologia Katedro. La aplikitaj eldonaĵoj estis: la 1964. jara Jarlibro de la Katedro pri Mineraloj- kaj Petrologio, de la Hungara Geologia Instituto, pli de la geologo Juhász, Árpád. Rememoroj de Jarmiloj – Geologia Historio kaj Mineraltrezoroj de Hungario - estas la titolo de la libro, eldonita en jaro 1987.

Nu, la bela Roko Molnár, situas en ĉ. 390 metra marnivela alteco, en proksimeco de la landvojo Miskolc-Lillafüred-Eger.

Ĝi estas alproksimigebla laŭ turistvojoj, kiuj kondukas sur la montokrusto. Unu kondukas el Lillafüred, per atingo de la Groto Szeleta (Seleta). La alia ekiras de la menciita landvojo –de Miskolc-Lillafüred-Eger), de la Csanyik (Ĉanjik) vala haltejo de la aŭtobusoj nro5 kaj 15, trafikantaj al Lillafüred.

Ĝi estas blanka kolora kalkŝtonroko, de sur kiu ni povas rigardi vid-al-vide la montoflankojn de la montaro Bükk. Se ni havas sukceson, ni povas ekrigardi kaj la arbaran malgrandan trajnon inter la foliaro de la fervojon kaŝantaj montoflankaj arboj, kaj la per etendigitaj flugiloj flugantajn sovaĝbirdojn.

Al tiu roko, kiun signas kruco, ligiĝas ankaŭ legendoj pri tragedioj. Pri unu, skribis ankaŭ Jókai Mór:, la granda hungara „fabelanto” - verkisto de la 19-a jarcento.

Sub la roko, apud la landvojo povas rigardi la vojaĝanto, la tn. „Bedő-pinoarbaron” konsistantan el nigraj pineoj - plantigitan de Bedő, Albert. Super tio altiĝas la legenda roko. Dum la 1860-aj jaroj ĉe la tie fluetanta rivereto Szinva, funkciis ankaŭ du akvomueliloj. Nu, la legendo ligiĝas al unu el ili, pri kiu skribis Jókai Mór kaj nun ankaŭ la Vikipedio rememoras. Laŭ la legendo verkita de Jókai Mór:

Filino de la riĉa muelisto enamiĝis en la malriĉan helpanto-fraŭlon de sia muelistpatro. La gejunulojn geedziĝi ne permesis la rigora patro, kiu volis edzon doni al ŝi same riĉan, terbien-havanton, por sia filino.

La dato de la geedziĝceremonio estis jam pridecidita, kiam la amanta paro decidis pri la tragedia solvo de ilia am-vivproblemo. Ili kune desaltis de sur la kruta blanka roko. Tiel ili sin memmortigis. Tiel ili kuniĝis en la morto, trapaŝante tiun sojlon, pri kio ili aŭdis jam pli frue. Ili aŭdis pri tiu, ke iam iu desaltis jam pri la roko, kaj la salton tiu ne travivis. Tiu homo transpaŝis de tie al la transmondo, kie atingis lin nur ĝojoj, paco kaj trankvilo. Ekde ilia tragedia paŝo havas la roko la nomon: „**Muelista Roko**”.

## Kiel sojlo, la blanka roko

Pri la **sojlo-rolo** de la alta, kruta blanka roko, kiel ili, ankaŭ mi aŭdis de mia avinjo kaj ŝi de la sia.

La unua, la ebla ekzemplondona fundamenta ago de la pli malfruaj agoj, estas multe pli frua ol ago de la muelista amparo. Ĝia historio devenas ankoraŭ el tempoj de la Krucmilitoj. En iu Bükk- montara vilaĝo vivis fortakorpa, viglamensa lerta servutulo, kiu ofte helpis dum ties militservaj vojoj sian sinjoron de la fortikaĵo de Diósgyőr. Li konis uzi ne nur la avelstangon, sed bone povis batali ankaŭ per glavo, li sciis kiel sin kaŝi, kiel pafi sovaĝajn bestojn kaj fari el ili manĝaĵojn. Li konis la kuracherbojn de arbaroj kaj kampoj. Li akompanis ankaŭ la baptofilon de la fortikaĵposedanto, al la „Sankta Tero” kaj de tie reen hejmen. Kiam ili hejmenvenis, jam estis malfrue. La vilaĝo de servutulo malproksime situis de la fortikaĵo. Do li pensis unue viziti sian fraton en la Szinva riveret-apuda vilaĝeto, tie ripozi iom, poste daŭrigi la vojon en sian hejmon. Sed la frato ne hejmenis, nur ties edzinon li trovis hejme. Sed la bofratino ne rekonis la bofraton, vane li klarigis kiu li estas. Kaj ŝi pensis eble rabisto estas li, ŝi komencis kriadi: Hej, rabisto! Rabisto estas tie! Hej, homoj, kaptu lin! La bofrato timiĝis, enkuris en la arbaron, kie lin la vilaĝanoj plu pelis. Li kuris tra arbaroj, arbaretoj, en veprejon de dornaj arbaraj kreskaĵoj. Ties branĉoj tranĉis, multpikis lian vizaĝon, la fruktoj kaj ties sukaj disŝiriĝis kaj sekiĝis sur liaj vangoj, sed la homoj ne ĉesigis la persekuton. Kaj foje, kiam ili alproksimigis lin kaj vidis, komencis kriadi ankaŭ pri tio, ke li estas leprulo. Li komprenis jam nenion. Li malsatis, soifis, nur la senliman teruron kaj la grandiozan timon sentis. Kaj, neatendite li atingis la blankan rokon. Dume li estis jam tutlacega kaj plen-plena de amareco pro sia malfeliĉa sorto.

Sur la roka pinto li pensadis iom, kaj poste saltis, ĉar malantaŭ li kaj antaŭ li eksonis la duraj kriaĉoj de la lin pelantoj. Li ne havis jam forton plie vivi kaj trapaŝis la sojlon, por ne havi pli da malfeliĉo. Li volis ripozi, volis la pacan trankvilon, li volis tiun mondon kie li ne sentas pli da doloroj, malsato....

Kiam li la lastan suspiron prenis tie kien li subfalas, alvenis tien la vilaĝjuĝisto kaj ordonis: por verŝi sur tiun unu sitelon da riveretakvo, por povu li rigardi kiu estas tiu kompatindulo kiu tiel obstine volis eniri la vilaĝon nokte. La akvo surlavis de la vizaĝo ne nur la polvan ŝviton, sed ankaŭ la sovaĝfruktojn. La servutularo preĝante por animo de la mortinto povis konstati, ke tiu ne estis leprulo. La dume tienalvenanta homo: la frato rakontis, ke la anime kaj korpe ĝisvivfino tro insultita homo estis tiu bravulo de la servutuloj, kiu senpare brav-heroo estis de la ĝistiamaj jarcentoj. Bedaŭrinde mortigis lin la homa stulteco, li iĝis viktimo de la blinda fervoreco.

## Nuntempa sojlo

Bedaŭrinde, ankaŭ nuntempe okazas homaj tragedioj, kiujn pluvivi la homoj ne havas ĉiam sufiĉan korpan-animan forton. Mi vidas tiel, ke en tiuj anime orfaj-solaj homoj je efiko de la multaj suferadoj mortis la pacienco, toleremo, la vivsopiro, la vivlukto, la volo por rikolti venkon. Ili kolektas siajn restintajn fortojn nur al unu paŝo por la fina, al tiu por mi kaj ankaŭ por la plej terura, per kio ili trapasas la transmondon. Kaj tiu trapaso okazas sen helpo de aliuloj, ili problemsolvas fiere, nur simple, sole si mem. Povas esti, ke ili elektas ne la rokon Muelisto, sed elektas: medikamentojn, trinkaĵon, drogojn, gason, salton en fluantan akvon, mempendigon kaj aliajn eblecojn.

Antaŭ tri jaroj okazis la sekvanta problemsolvo.

Maria, la junedzino tre kontente vivis kun sia bela bona edzo kaj adorata filineto. Nur ombris sian vivon la kuracista atentigo, havante ĝin ekde sia nasko, ke malpermesatas por ŝi denove

naski pro sia grava kormalsano, ĉar eble ŝi ne travivus la naskon. Malrapide malfacile tamen ŝi jam akceptis la fakton kaj pensis nur pri tio, ke ili vivu bele kune kun, ke ŝi povu tute pleneduki kune kun sia bona edzo, ilian filineton. Sed, kiam la filineto estiĝis kvar jara, la edzo komencis unue diradi, sed poste jam postuli la novan infanon de la edzino. Li diris ankaŭ tion, se ŝi ne entreprenos naski, do li forlasos ŝin. Li elektos tiun edzinon, kiu naskos al li du infanojn. Maria, la junedzino timante por perdi la bonan edzon post siaj tri antaŭaj malbonaj, do entreprenis la novan naskon. Laŭ konsiloj de la kuracistoj, ŝi kuŝis de komenco ĝisfine la 9 monatan gravedtempon kaj fine feliĉe naskis belan fileton. Sed, vane estis ĉio, vane estis la granda feliĉo. La bela fileto mortis tri tagojn post la naskiĝo. Nur post la nasko evidentiĝis, ke super lia koro kreskis infanpugnogranda tumor. La observo pruvigis, ke la infano havis kanceron kaj nesavebla estis. Post la entombigo, la edzino estiĝis tre malforta, pro la daŭra plorado de sia mortanta etfilo. La bonedzo forlasis la edzinon. Kiam ŝi jam havis rajton hejmeniri el la hospitalo, trovis nek sian edzon, nek la filinon. La genajbaroj informis ŝin kie trovi ilin. Ŝi iris por viziti la nunan amikino de sia edzo, kie vivis nuntempe siaj familianoj. Sinjorino Edit la amikino, timiĝis pro la rigardo de Maria, kaj dirante ke baldaŭe portos dolĉan kukon al Maria kaj la eta Helena, ŝi rapidiris en la kuirejon por telefoni al Adamo pri la okazintaĵoj kaj demandi pri tio, kion fari.

Kiam Maria alvenis, sinjorino Edit purigis la fenestrojn de la apartamento estanta ĝi sur la deka etaĝo de la altdomo.

Dum ŝia forresto la patrino kisadis, kaj demandadis sian infaneton pri ŝia bonfarto, poste post ioma paŭzo novan demandon faris al la filino:

- Kara mia filineto, mi nun volas viziti Dion kaj demandi lin kial li forprenis de mi vian frateton. Ĉu vi ne volus demandi la samon de Dio? Se vi ŝatus tiel agi antaŭ la lumbril vanga Dio, venu kun mi. Nun ni staros sur ĉi doman ŝtuparon kaj unue iros antaŭ vian patron, kiu atendas nin antaŭ la domo, poste ni stamfos sur la tero kaj saltos tuj al Dio, kiel kutimas. La infano jesis.

Ili prenis manon unu de la alia kaj trapaŝis la sojlon, ili paŝis eksteren el fenestro de la deketaĝa altdomo. Ili atingis la teron ĝuste en la sama tempo kiam alvenis tien Adamo la „bona edzo”.

Verkita de Adri s-rino Pásztor

## Adri Pásztor

### La plupaŝo

En la supre menciitaj kazoj mi rakontis pri vivo kaj morto de kelkaj kompatindaj homoj. Ilia lasta paŝo; solvanta siajn vivproblemojn, konante ties antaŭajn okazintaĵojn, estas komprenebla. Sed vi, kara leganto eble povas pensi, ke ankaŭ mi sugestas tiun-ĉi problemsolvon.

Mi ne akceptas tiun-ĉi paŝon. Mi estas kreda akceptanto de resto de la vivo. Mia moto estas la sama, kion formuladis nia granda poeto Madách, Imre en sia verko: *La Tragedio de l' homo*, en traduko de d-ro Kolomano Kalocsay:

**„... luktu, hom' kaj firme fidu!”**

En la naturo ĉiu vivaĵo havas sian rolon, pere de kio ĝi certigas la harmonion. En la naturo ĉiu vivantaĵo de siaj apero ĝis forpaso vivas la naturan procezon de sia vivo. Jam okazis, ke iu

estaĵo savante vivon de alia animalo, eĉ vivon de sia ido, foroferis la sian. Sed, ne okazis, ke tiu memvole forĵetu sian vivon aŭ la samon de sia ido.

La vivo belas, sed bedaŭrinde tre mallongas

Ni homoj pensas, ke ni estas la krono de la kreo. Ej, do ni devas vivi tiel, ke ni ekzemplodonu por ĉiuj-tiuj, kiuj vivas kune kun ni aŭ ĉirkaŭ ni kaj ielmaniere ligiĝas al ni. Donu ni ekzemplerojn ne je la vivforĵeto, sed je la viv-volo, je la scio pri lukto, je scio de la supervivo. Por la disrevigitoj senekvilibras homoj devas ni akceptigi la fakton, ke la vivo plen-plenas per miloj da ĝojetoj, kaj tiuj ĝojoj, belecoj atendas atingi ĉiujn, kaj ĝuste tial malpermesatas preterpasi ilin. Ne nur tiu havos la glorion kiu povas ekhavi sian animan ekvilibron. Sed ĝin ricevos ankaŭ tiu, kiu povos restariĝi post ĉiu falo kaj povas denove paŝi antaŭen kaj pluir sur sia vojo.

Foje, maljunulo konsildonis al mi:

- Se mallumas ĉirkaŭ vi, bruligu kandelon! – konsilis li
- Kial ne lampon, ja ĝi donas pli da lumo? – redemandis mi.
- Unue sufiĉas ankaŭ la kandelo... respondis li.

La helpodono ni provu komenci per malgranda paŝo, ĝis ni ne vidas la agindaĵon pli klare. Se mallumiĝis la ĉielo, la homo senesperigis, ankaŭ la malforta lumo donas esperon. Ni faru paŝon post paŝo. Gravas, ke la endamaĝiĝintulo ne rifuzu ĝin! Tiu eta ago povas esti grava, kiu povas rekonduki la helpopetanton sur sian vojon. Ja, ni vivas nur unufojon! Do, ni devas eksperti eble la plej multon el la vivigaj ĝojoj, belecoj, bonoj, agrablaĵoj, kiujn la homoj povas havi de la vivo, pro sia simpla ekzisto, kaj tiujn ni povas transdoni al aliuloj.

Certe ankaŭ vi jam travivis tiun miraklon, kiam rakontante al aliuloj pri iu via ĝojo, vi rericevis de ili la saman ĝojsenton ridetante kaj senenvie. Kaj kiam vi konfesis al la samuloj pri via malgajeco, fiasko, aŭ pri via senfeliĉa situacio, el inter tiuj homoj ĉiam estis iu, kiu senegoisme bonsukcese helpis vin. Poste vi povis daŭrigi vian vojon pro tiu amika konsento, amika eta ago, kiuj tamen ŝajnis al vi grandiozaj agoj.

Ne forgesu mian moton: luktu hom´ kaj fide fidu!

Do: kuraĝu rakonti pri viaj ĝojoj kaj malfeliĉoj! Ne restu vi sola kun viaj damaĝoj, kaj akceptu ankoraŭ la ŝajne tre malgrandan, aŭ malvaloran sed bonintencan helpon! Tiuj gvidos vin tra la malklareco. ***Tiuj ŝajne etaj, sed tamen tre gravaj paŝoj: la fido en viaj homfratoj, proksimuloj, la kredo en la vivo kaj la amo kondukas nin sur tiu vojo, per kiuj ni povas finiri nian vojon en la eterna harmonio de la naturo.***

## Amri Wandel

### La peranto

Kiam oni demandas  
„kiel varbi por esperanto?”  
Mi respondas verse:

Certe konas vi, leganto  
Faman ŝercon,  
Rima kanto:  
Esperanto – edz-peranto

Sed dependas de la aĝo  
Karaktero de l' varbaĵo  
Kaj por lingvo Esperanto

Tre varias la peranto:  
Por la beboj – suĉ-peranto  
Por infanoj – song-peranto  
Por geknaboj – sent-peranto  
Junulinoj – svat-peranto

Por modernaj junulinoj,  
Viroj ĉiaj, virgulinoj  
Ja konatas la inklinoj:  
Esperanto – seks-peranto  
Por geamantoj – kor-peranto  
Por fraŭlinoj- edz-peranto  
Patrinemaj solaj inoj –  
Sem-peranto, punkto fino

Laste por la maljunuloj  
Hipokondriaj malsanuloj:  
La plej bona kuracanto –  
Esperanto – san-peranto  
Per Esperanto eblas ĉio  
Sed depende de l' metio:  
Parlamentano – leĝ-peranto  
Ĉefministro – seĝ-peranto

Estas pastro sankt-peranto  
Muzikisto – son-peranto  
Magiisto – sorĉ-peranto  
La sportisto – torĉperanto

Sciencisto – sci-peranto  
Komputiisto - mus-peranto  
Por verkisto – muz-peranto  
La aktor' – amuz-peranto

Advokato – leĝ-peranto  
Ĵurnalisto leg-peranto  
La riĉulo – sum-peranto  
Malriĉulo – ŝpar-peranto

Tiel aĝe kaj metie  
Disvastiĝos pli kaj plie  
Sendepende de l' peranto  
Nia varb' por Esperanto.

(N-ro 148-149. Somero-Vintro 2008: Festa numero de Israela Esperantisto)

**TIBOR SEKELJ**

**TEMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO**

**Tradukis Terezija Kapista**

La titolo de la originalo TEMUDŽIN – DEČAK STEPE

Eržebet Sekelj, Subotica

Lektoris, la poemojn tradukis kaj la titolpaĝon desegnis: Marko Petroviĉ

Ilustris: Hunor Ĝurkoviĉ

Kompostis: Dimitrije Janiĉiĉ

Eldonisto TEREZIJA KAPISTA

Novi Beograd

Studentska 39/23

Jugoslavio

1993.

Presis: SZR sava Todorov, Dubrovaĉka 3 Beograd

Eldonkvanto:500

**- PARTO V-a -**

-daŭrigo -

**PERSEKUTADO DE LA ĈEVALŜTELISTOJ**

Ĉiuj travivaĵoj de Temuĝin estis notitaj en la „Sekretea Historio de la Mongoloj”, verkita antaŭ kelkaj jarcentoj. Notita estas ankaŭ tio, ke Temuĝin naskiĝis en la jaro 1155 t.e. antaŭ pli ol okcentjaroj. Kiel eblas, ke inter ruĝaj kovrilpaĝoj de antikva libro dum tiom da jarcentoj estis konservita la sorto de unu knabo? Eble pro tio, ĉar al tiu knabo estis destinita aparta loko en la historio de mongola popolo.

Tiel, notita estas ankaŭ tio - la lamao daŭrigis sian rakonton – ke la rabistoj subitis al jurto de Temuĝin, malnodis ĉiujn ok ĉevalojn – kiom da ili tie estis - kaj forkondukis ilin kun si, eĉ meze de heltago. Temuĝin kaj la familio rigardis ĉion tion, ne povantajn ion ajn entrepreni. Temuĝin kaj unu frato postkuris la rabistojn perpiede, ne havante ĉevalojn, kriegante kaj petante, ke ili redonu al ili la ĉevalojn, sed ĉio estis vana.

Nur en vespero aperis Belgutej, la pli juna frato de Temuĝin, kiu revenis el ĉasado, kondukante la naŭan ĉevalon, la unu solan, kiu nun al familio postrestis. Li kondukis la ĉevalon je la brido, ĉar ĝi estis tiom troŝarĝita per meloj, ke ĝi apenaŭ povis paŝadi.

Kiam ili rakontis al li kio okazis, li tuj volis postkuri la ĉevalŝtelistojn. Sed tiun rolon prenis al si Temuĝin, kiel la plej aĝa en familio.

- Vi alportis tiom riĉan ĉasaĵon, ke vi meritas iomete ripozi – diris al li serĉeme Temuĝin.

- Se ni havus ankoraŭ unu ĉevalon, plej volonte mi rajdus kun vi, eble ni kune pli rapide realigus nian taskon – diris Belgutej. – Sed nature mi ne dubas, ke vi ankaŭ sola sukcesos en ĉiu via entrepreno.

La morgaŭan tagon Temuĝin ekrajdis sur sia ĉevalo por serĉi la ĉevalŝtelistojn. Tri plenajn tagojn li sekvis la ĉevalspurojn en la alta stepa herbo. Dumnokte li devis halti por neperdi la spurojn. Dumnokte li kaŝis sin en iun valon kaj tie ripozis por post mateniĝo

daŭrigi la vojon. Multe li cerbumis pri tio kiel li sola solvos la aferon kun la tuta bando da rabistoj. Ne povinte ion ajn saĝe konkludi li kredis, ke nun refoje al li helpos lia bona stelo.

La kvaran tagon li atingis grandan ĉevalaron, apud kiu junulo estis melkanta la ĉevalinon. Kiam Temuĝin aliris link aj demandis pri homoj, kiuj estis pelantaj ok ĉevalojn, tiu ĉi respondis al li:

- Hodiaŭ, ĵus dum mateniĝo ĉi tie pasis tiuj, pri kiuj vi demandas. Mi montros al vi, kien ili foriris.

- Tuj li lasis sian laboron, donis al Temuĝin freŝan blankĉevalon kaj mem ĵetis sin sur brunĉevalon. Li aldonis:

- Amiko mia, mi vidas, ke vi estas en grava malfacilaĵo. Estas vira devo helpi unu la alian en malbono. Mi deziras helpi al vi. Kaj ne nur hodiaŭ, sed ĉiam, kiam vi tion bezonos. Mi deziras interfratiĝi kun vi. Mi estas Borĉu, la solfilo de Naku-bajan.

- Temuĝin ne sciis kion fari, tiom li estis agrabla surprizita pro la belaj vortoj de Borĉu, precipe pro lia preteco helpi. Laŭ lia opinio, jen estas tiu bona stelo, pri kiu li cerbumis dum duono da nokto kaj fidis al ĝi. Li prete respondis:

- Ĵurfrato mia, Borĉu, mi estos de hodiaŭ via fidele kamarado. Mia nomo estas Temuĝin kaj mi estas la plej aĝa viro en mia eta familio. Mi kredas, ke neniu povas nin venki, se ni estus unuecaj,

Per unu vira manopremo ili fiksis la fratiĝon. Poste, sen tempoperdo ili ekrajdis al vojo.

Dum la tuta tago ili sekvis la spurojn en la stepa herbo.

Kaj samtiel ankoraŭ dum du tagojn.

Subite en fono ili ekvidis kelkajn tendojn kun rondaj ŝafejoj apud ili. Rande de ŝafejo paŝtis ok ĉevaloj.

- Borĉu, frato mia - diris Temuĝin - jen la serĉataj ĉevaloj! Restu tie ĉi kaj mi elpelos ilin.

Sed Borĉu rediris:

- Kial mi restu? Mi venis esti via ĵurfrato kaj tio signifas, ke ni dividos eĉ la plej malbonajn momentojn, ĉu ne?

Tuj poste ili kune atakis la ŝafejon kaj elpelis la ĉevalojn.

La homoj elkuris el tendoj, konsciiĝinte post surprizo, sursaltis ĉevalojn kaj postkuris ilin.

La pelantoj havis avantaĝon super ambaŭ ĵurfratoj. Ili ne povis tiel rapide rajdi, devante zorgi ankaŭ pri tiuj ok ĉevaloj, por ke ili ne perdiĝu. Tiel okazis, ke la pelantoj pli kaj pli proksimiĝis al ili. Precipe unu el ili rajdanta sur blankĉevalo pli rapide ol la ceteraj. Tiom li proksimiĝis al fuĝantoj, minacinte atingi ilin.

Tiam Borĉu diris al sia amiko:

- Ĵurfrato, donu al mi vian pafarkon kaj la sagon, mi ekbatalos kontraŭ tiu homo.

Sed Temuĝin rediris al li:

- Mi timas, ke vi havos malbonaĵon pro mi. Mi batalos kontraŭ li.

Li turniĝis preta elpafi la sagon. En tiu momento la pelanto haltis atendi la aliajn kamaradojn. Tiam Temuĝin denove turniĝis kaj aliris la ĵurfraton, feliĉe pro tio, ke li ne devis uzi la armilon kontraŭ sia pelanto.

Ĵus tiam komencis vesperiĝi. Kiam ili iris malantaŭ la monteto, Borĉu kaj Temuĝin decidis preferi blagdirekton trompi la pelantojn.

En krepusko la pelantoj ne povis ilin vidi pro tio ili baldaŭ returniĝis kaj malaperis en mallumo. Post tio la ĵurfratoj sentis sin trankvilaj. Ili malakcelis la galopon kaj kore ekridis:

- Tio ĉi sukcesis pli facile ol mi esperi povus - diris Borĉu. Estas facile se la homo havas ĵurfraton. Mi ne scias kiel mi tion farus sola? - aldonis Temuĝin, kaj ambaŭ denove ekridis. Ili eĉ ekkapricis kanti...

*Steloj tremas, stepo ĝemas,  
obskur' landon premas,  
firmamento alte tendas –  
kuraĝigajn stelojn sendas;  
Ĉevalsturmas ventobato  
ankaŭ mi kaj mia frato.*

Ili denove ridis. Al ili ambaŭ ŝajnis, ke ili mem elpensis la finon de ĉi tiu kanto, sed tamen tiel plaĉis al ili.

Tri tagoj de rajdado, kiuj sekvis, pasis relative rapide, ĉar la ĵurfratoj bonege kunakordis. Ili interparolis, ŝercis kaj foje eĉ ekkantis. Neniam tri tagoj al Temuĝin pasis tiel rapide kiel nun. Fine ili atingis la jurton de Borĉu, de kie ili kune estis ekirantaj.

Ili ekceliĝis por iomete ripozi. Tiam Temuĝin diris:

- Dank' al via helpo, ĵurfrato mia, mi reakiris miajn ĉevalojn. Mi deziras dividi ilin kun vi. Diru, kiom da ili vi deziras.

- Sed Borĉu preskaŭ kolere respondis:

- Mi ekiris kun vi por esti via ĵurfrato kaj helpi al vi en via malfacilaĵo. Kia estus tia helpo, se mi postulas la servopagon? Ĉu tio estas predo, ke ni dividu ilin? La ĉevaloj estas viaj kaj viaj devas resti! Mi jam diris al vi, ke mi estas la solfilo de Naku-bajan kaj mi heredos de li, kiom sufiĉas al mi.

Tiel paŝante ili alvenis ĝis ŝafejo de Naku-bajana jurto. Kiam la domanoj ekvidis Borĉuon ekestis grandega ĝojo, ĉar iliaj gepatroj kredis, ke li malaperis por ĉiam, eĉ pli pliploris lin. Naku-bajan ploris pro la ĝojo havante apud si la solfilon. Tamen li ne povis elteni sen riproĉi lin, ĉar li malproksimiĝas tiel for de sia jurto dirante nenion pri tio. Kaj li tion faris. Vere kio okazis?

- Kio okazis? - rediris Borĉu – nenio speciala. Mia amiko en granda malfacilaĵo venis al mi. Mi decidis estiĝi lia ĵurfrato, ĉar li ekplaĉis al mi ekde la unua momento. Kaj kiel ĵurfrato mi decidis helpi al li. Jen, tio okazis kaj nun mi estas denove hejme, patro.

- Brava knabo vi estas, mi devas konfesi. Vi scipovas estimi la amikecon kaj la ĵurfratecon. Vi ne plu estos sola, eĉ kiam vi malproksimiĝas de patra jurto.

Dum la tuta tago daŭris la festeno ĉe rostita virŝafo, kumiso kaj sala teo kaj aliaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Morgaŭ post la bona ripozo Temuĝin denove vojaĝis. Iliaj novaj amikoj bone provizis lin per manĝaĵo ka trinkaĵo, Naku-bajan diris:

- Junaj estas vi ambaŭ! Nun kiam vi estas ĵurfratoj bone gardu unu la alian kaj nelasante vin sola en malfeliĉo. Solidareco multon signifas en la vivo. Unu fadenon eĉ infano povas rompi. Sed kiam plektiĝas multaj tiaj fadenoj en ŝnuregon, ne ekzistas forto, kiu povus disŝiri ĝin.

Fortrinkante kelkajn glutojn da kumiso, li daŭrigis:

- Granda manko de nia Mongoloj estas la malamo inter ni, la envio kaj interatakado. Se ni estus unuecaj, la tuta mondo povus esti nia! Memoru tion, vi kiuj estas junaj, vi kiuj ankoraŭ povas ŝanĝi nian nunan stepan mondon.

Tiuj lastaj vortoj de Naku-bajan ankoraŭ longe resonis en oreloj de juna Temuĝin, dum li sola kun naŭ ĉevaloj kaj la deka kiun Borĉu donacis al li, rajdis tra senfina stepo kiu nun helverdis. „La tuta mondo povus esti nia” ripetadis Temuĝin cerbumante pri tio kiel realigi la unuecon de ĉiuj ĉirkaŭaj triboj. Fakte, li nun komprenis, ke al li estas malklare, kial ili estas unu kontraŭ aliaj tiel malamikemaj. Tiaj estis la pensoj dumvojaj, kiuj amuzis aŭ ĉagrenis lin, ke li mem estis surprizita, ke la tempo pasis rapide. Nerimarkinte, jam li troviĝis antaŭ sia jurto, li apenaŭ rimarkis, ke tri tagojn li estis rajdinta.

Ili akceptis lin kun granda ĝojo, mirante kiel li sukcesis trovi kaj repreni la ok ŝtelistajn ĉevalojn. Per tiu sukceso altiĝis lia renomo, ne nur en lia familio, sed ankaŭ ĉe tiuj, kiuj nur aŭdis pri lia bravaĵo.

La morgaŭan tagon Temuĝin iris ĉasadi kun sia frato Bejgutej. Ili estis bonhumoraj. En unu momento dum ripozo Bejgutej demandis sian fraton:

- Grandas la bravaĵo kiun vi faris kaj mi sincere admiras vin! Ĉu volus klarigi al mi, kiel vi sukcesis reakiri la ĉevalojn? Mi sentas, ke mi povus multon lerni de vi.

- Mi volas. Mi klarigos la sekreton de l' sukceso. La sekreto estas, ke mi ne estis sola. Dumvoje mi akiris amikon, ĵurfraton Borĉu-on. Kaj vi ankaŭ certe scias, ke du solidaraj povas fari pli multe ol dek neunuecaj.

- Mi ne dubas, ke tio estas tiel.

- Ankoraŭ io! Mi konatiĝis kun la patro de Borĉu, Naku-bajan, tre saĝa homo. Li diris se ni Mongoloj estus unuecaj inter si, la tuta mondo al ni povus aparteni.

- Kiel li tion opinias? – demandis Bejgutej.

Kiel li opiniis, mi ne scias. Sed ankaŭ mi nun cerbumadas pri tio. La rigardo de Temuĝin fuĝis ien foren, kiel ondanta linio de horizonto unuiĝas kun arko de l' ĉielo.

Belgutej sekvis lian rigardon, sed nenion specialan li rimarkis tiudirekte. Tie ja estis nenio. Eĉ se estus ionekutima, tio estis en korprofundo de Temuĝin.

## LA FELO, KIU ŜANĜAS LA HISTORION

La tagoj pasadis kaj ŝajnis pliboniĝis la stato al familio de Temuĝin. Ne mankis al ili manĝaĵo kaj ankaŭ al najbaroj ĉesis ĝeni ilin.

Iun tagon la familio decidis forporti sian jurton por iri kaj serĉi Borte-on, la fianĉinon de Temuĝin, por venigi ŝin al si.

Por tiu vojaĝo ili elektis pli longan, sed pli certan vojon. Ili ne havis kialon, rapidi, pro tio ili ne hastis. Verdire ili eĉ ne povis alimaniere, ĉar la ĉevaloj estis ŝarĝitaj per la tendo kaj alia posedaĵo de familio. Dum voje ili ankaŭ ĉasadis kaj vespere faris fajron kaj rostis la ĉasaĵon.

La sepan tagon ili ekvidis en foro blankan jurtejon de tribo Olkunout, tio ĝojegis ilin. Ĝojkaŭzoj ja estis pluraj. Temuĝin venas por si fianĉino Hoelun, lia patrino venas al sia tribo, al homoj inter kiuj ŝi kune kreskis, sed kiujn ekde infanaĝo ne vidis. Ankaŭ la junaj fratoj de Temuĝin ĝois pro la konatiĝo kun la homoj, pri kiuj ili jam multon aŭskultis de sia patrino.

Dejseĉen akceptis ilin kun granda ĝojo kaj honoro, kiujn meritas la eminentaj parencoj. Borte – kiu intertempe elkreskis kaj estiĝis vera belulino – pudore, sed ĝoje venis saluti la gastojn. Dum la sekvontaj du tagoj la jurto de Dejseĉen estis la plej grava en la jurtejbivako. La parencoj de Hoelun venadis unu post aliaj por vidi ŝin kaj interparoli kun ŝi. Ili revokis memorojn, la travivaĵoj bonaj kaj malaj, el infana kaj el kaj el ŝia fraŭlina aĝo. La babilado kaj ridado estis nefinebla.

Ŝi estis invitata al la aliaj jurtoj kaj ŝi vizitis ĉiujn laŭvice. Dume ŝiaj infanoj konatiĝis kaj amikiĝis kun siaj samaĝuloj.

La kvaran tagon venis la momento por geedziĝo. Tio estis solena momento, en kiu entis la parencoj kaj la amikoj solenvestitaj, la lamao balbutis nekompreneblajn vortojn fojfoje blovante al la kornon.

Ĉiuj kune kantis la edziĝfestan kanton, sekvis trinkado kaj manĝado.

Temuĝin kaj Borte ankaŭ estis solene vestitaj. Ili staris unu apud alia, sed sekrete iam-tiam ili kaŝrigardis unu la alian.

Laŭ la malnova kutimo la patrino de Borte donacis al la familio de hunedzo valoran peltomantelon. Verdire, tiun peltomantelon devus ricevi la patro de junedzo. Sed Jusigej delonge jam estas mortinta. Tial – je la nomo de sia familio la valoran donacon transprenis

mem Temuĝin – dum li karesante per fingroj la veluran surfacon de pelto, en lia vasta imago, ĝermis planoj, pri kiuj laŭte li ne kuraĝis paroli, ĉar ĉiuj ili povis ŝajni tro fantaziaj. Sed li ne zorgis pri tio, kion aliaj homoj povus opinii. Li decidis realigi siajn planojn.

Unu tagon post festo, la familio kunprenis siajn aĵojn kaj kune kun Borte reitris la vojon al regiono, kie ili jam antaŭe vivis.

La juna Borte rapide adaptiĝis al nova familio. Ŝi estis lerta, milda kaj tre helpinta al sia bopatrino en zorgo pri familio.

Post iu tempo, Temuĝin preparis sin al vojo por viziti malnovan kaj eminentan amikon de sia patro, Toril-ĥanon, la estron de tribo Kereita. Kvankam surprizita Toril-ĥano amike akceptis la simpatian junulon. Sed la vera surprizo nur sekvas.

Post la konvencie afablaj vortoj, Temuĝin ambaŭmane kiel mongolkutime oni transdonas la donacojn, la peltmantelon, faritan el valorega felo, donis al ĥano kun estimplenaj vortoj diris:

- Estimata Toril-ĥano, mi petas vin akceptu tiun ĉi donacon kiel simbolon de estimo de mia familio al vi

- Al Toril-ĥano larĝe malfermiĝis la okuloj pro la surprizo. Kial tiom valora donaco de iu, kiu neniom ŝuldas al li? Sed la klarigo de la junulo tuj sekvis:

- Tiun ĉi pelton mi ricevis kiel edziĝfestan donacon de mia bopatrino -, kaj laŭ nia kutimo – ĝi devus aparteni al mia patro. Sed – ĉar mia patro jam delonge ne estas inter la vivantoj – mi preferus, ke lia amiko estu mia adoptopatro. Kaj tial al vi Toril-ĥano, estas destinata tiu ĉi donaco.

- Ekzaltita pro donacbeleco kaj per atentemo, kiun la junulo esprimis al li, Toril-ĥano deklaris, ke li ĝoje akceptas la patrecon kaj klopodon anstataŭigi la bravan amikon Jisugejon, se tio estas necesa.

- Al sia novadoptita dommastro prezentis la honorlokon apud si, en jurtofono, kie li ankaŭ sidiĝis. Du junaj virinoj regalis per kumiso kaj sekve per diversaj manĝaĵoj, kiuj ŝajnis al Temuĝin tro luksaj, ĉar iuj el ili li eĉ ne konis, kvankam li kreskis en tiu sama stepo. Ĉio estis prezentita en la fajnaj porcelanaj ujoj faritaj en Ĉinio, kiajn ĝis nun Temuĝin ne havis okazon vidi.

- Kvankam ĉio tio impresis forte la junulon, eĉ por unu momento ne perdis el konsidero la celon, kiun li starigis al si. Post la kutima babilado pri vetero, ĉevaloj kaj pri sano, Temuĝin rakontis al sia adoptopatro, ke la parencoj forlasis la familion post la morto de lia patro kaj ĝi restis sola, kiel senprotekta predo por ĉio, kiu volus ataki ĝin kaj tiaj estas multaj.

- Estus bonege, se denove la servistoj kaj patencoj kolektiĝus ĉirkaŭ mia familio. Spaco sufiĉas en nia regiono kaj mi deziras vivi en paco kun ili ĉiuj. Adoptopatro mia, Toril-ĥano, mi kredas, ke via reputacio povus multom kontribui al realiĝo de tio.

- Mi komprenas, adoptofilo de mia, kaj mi volonte helpos al vi, kiam ajn vi tion bezonas. Kiam vi taksos momenton trafa, vi sendu viajn kurierojn al mi kaj mi disponigos al vi miajn homojn. Por nun eĉ Temuĝin ne povis esperi pli ol tion.

- Li estis kontenta forlasinte sian adoptopatron kaj la vojo hejmen ŝajnis tiel mallonga, kvazaŭ li perflugiloj alŝvebis.

- Ne pasis multe da tempo kaj aperis novaj malbonaĵoj.

- Tajĉiutoj, kiuj neniam akceptis la fuĝon de Temuĝin, ĉar ili tion taksis kiel ilian grandan honton, denove atakis la familion, kun intenco pereigi ĝin. El eta familio denove restis nenio alia, ol haste refuĝi en arbustaĵon de proksima arbaro.

- La viroj kaj virinoj, same kuregis sur siaj ĉevaloj. Nur Borte estis en ĉaro veturanta, kasita sub ŝarĝo de lano. Akompanata de iu maljunulino.

- Ili ankaŭ kredeble ĝustatempe atingus la rifuĝejon, se intertempe ne rompiĝus la akso de ilia ĉaro. Ili postrestis duonvoje, ne sciante kion entrepreni, sciante, ke la rajdantoj ne helpos ilin, ĉar ankaŭ ili mem estis en danĝero.

- La malamike iniciataj pelantoj baldaŭ atingis la ĉaron. Ili ne bezonis longan tempon por konstanti, ke sub la lano estas io kaŝita. Skrapserĉe el lano ili eltiris Borte-on kaj kaptinte ŝin, ili sin venĝis al la familio de Temuĝin.

- La familio redutiĝis meze de l' arbaro kune kun kelkaj parencoj kaj servistoj, kiuj intertempe helpe de Toril-hano revenis. Nun la defendo estis multe pli forta ol kiam Temuĝin estis ankoraŭ knabo kaj la familio soleca.

- Temuĝin sendis kurieron al sia adoptpatro por memorigi lin pri la promeso, kel i volontate helpos okaze de danĝero kaj informi, ke la helpo estas ĵus nun bezonata.

- La alian kurieron ili sendis al sia amiko de infanaĝo al sia ĵurfrato Ĝamuki por peti ankaŭ lian helpon. Verdire li jam delonge ne renkontis Ĝamukon, sed li esperis, ke la ĵurfrato ne forgesis lin.

- Certe kuriero proponis al li aliancon ankoraŭ por la aliaj entreprenoj, pri kiujn ili poste priparolos persone.

- Ambaŭ volontate konsentis. Ili persone alvenis kun kelkdekoj da sagpafistoj, kiuj tuj dispelis la agresemajn atakantojn.

- Kaj dum la sagistojn – ĉe bona manĝo kaj trinko – kiujn ili mem alportis, regalis sin okaze de venko Temuĝin vokis Toril-hanon kaj Ĝamukon sub sian ĵurton por interparolo.

- Amikoj miaj, adoptpatro kaj ĵurfrato, diris Temuĝin, mi povas danki vin pro via rapida kaj sukcesa helpo en momento, kiam mi troviĝis en malbonaĵo. Sed mi tion ne faros. Anstataŭ tio, mi proponas mian helpon kiam ajn mi povus al vi utila esti. Vere, mi nun ankoraŭ havas ne multajn homojn, sed mi kredas, ke post tiu ĉi okazaĵo, revenos ankaŭ la aliaj familianoj al siaj malnovaj fajrejoj kaj nia forto denove iom signifos en nia regiono.

Po unu vazo da kumiso bone refreŝigis la gorĝojn de interparolantoj. Tiam Temuĝin daŭrigis:

- Mi proponas, ke ni faru kontrakton pri reciproka helpo en ĉiuj entreprenoj. Mi ellernis de iu saĝulo, ke nur la unueco faros nin valorajn. Se ni Mongoloj ĉiuj estos unuecaj, la tuta mondo povus esti nia!

Ĉi lastan opinion la junulo ekparolis tiom arde, ke neniu povis dubi pri ĝia vereco.

La amikoj ekstaris, ĉiu el ili prenis la manojn de aliaj du kaj tiel faris fortan ĉenon el kruciĝitaj manoj. Ili ĵuris aliancon en bono kaj malbono.

\* \* \* \*

Eksilentis la lamao-bibliotekisto. El proksimaj budaismaj temploj aŭdiĝis sonoj de trompeto kaj zimbalo, kiuj konsistigas parton de la preĝa ceremonio. Sonoj foraj ŝajne eksterteraj. En momento ŝajnis al mi aŭdi stepajn ventojn, tintadon de sabrojn kaj sagfajfadon tra branĉaro.

Ankaŭ la monako aŭskultis kun atento tiun misteran muzikon. Lia vizaĝo estiĝis rigida kaj la rigardon fraŭdis vakuo.

Mi ne scias, ĉu li ripetadis en si la preĝojn, kiujn liaj kolegoj deklamis en la preĝejo, aŭ liaj pensoj estis ĉe la juna kaj kuraĝa Temuĝin kaj lia taĉmento. Tio daŭris iom da tempo, sed mi volis rompi nek liajn pensojn, nek liajn sentojn.

Kiam ĉiuj sonoj mallaŭtiĝis kaj silento ekregis monakejon Erdeni-dzu, la temo pri „Sekreta Historio de Mongoloj” denove ekvivis sur lipoj de monako.

Lia mallaŭta voĉo, kvazaŭ venanta el profundo de malnova historio, denove plenigis la ejon.

-ni daŭrigos –

## Ŝercoj

### Ĉe psikiatro

La psikiatro demandas la malsanulon:

- Kio okazus, se mi detranĉus vian maldekstran orelon?
- Mi ne aŭdus.
- Kaj se mi detranĉus ankaŭ vian dekstran orelon?
- Mi ne vidus.
- Kial?
- Ĉar falus miaj okulvitroj.

### Nesatigebla sci-soifo

La instruistino renkontas la patrinon de iu sia instruato:

- Sinjorino, mi gratulas vin! En via filo estas nesatigebla sci-soifo. De kiu li heredis ĝin? Ĉu de vi aŭ de via kara edzo?
- De ni ambaŭ. La scion de mi, kaj la nesatigeblan soifon de lia patro.

### Dilemo

- Unu el miaj filinoj edziniĝis en Szeged, la alia en Pécs. Al kiu mi iru loĝi?
- Nu, kion opinias pri tio viaj du bofiloj?
- Tiu en Szeged proponas Pécs, kaj tiu en Pécs Szeged.

### Kverelo

La geedza paro kverelas.

- Notu bone, ke tiuj, kiuj antaŭ vi amindumis min, estis senescepte pli saĝaj, ol vi!
- La edzo: Tio veras. Mi ja edzinigis vin...

László Pásztor

## Amik-urbeco

Karaj gesamideanoj!

Kaj vi, kaj mi bone scias, ke tiuj urboj estiĝas ĝemelurboj, kies urbestroj kontraktas unu inter la aliaj pri ties estigo. Misxkolc, kaj la rusa urbo Vologda estas ĝemelurboj oficiale. Bedaŭrinde en tiu urbo ne vivas esperantisto. Ni povis kontrakti kun neniu pri tiu esperanto ĝemelurbeco. Sed mi eksciis, ke en proksimeco de urbo Vologda, situas N. Tagil. Do, mi kontaktis kun Larisa Kuzmenko, ke ni havu esperanto kulturan kontakton inter ni. Ja, se ni ne povas havi la esperanto-kulturajn rilatojn laŭ la ĝemelurbeco, kial ni ne havu amikurban. Pro la granda distanco inter ni, ni ne povas viziti unu la alian. Sed ni havas eblecon: rete ŝanĝi famojn, informojn pri okazintaĵoj en niaj urboj kaj kluboj, kaj mi povas sendi al ili nian Nordhungarian Informon, kiel informilon pri niaj okazintaĵoj kaj kulturoj nacia kaj esperantista.

Ni, deziras sendamaĝan, vigan kunlaboron ankaŭ al nia amika Esperanto Asocio en N.Tagil..

Adri, s-rino Pásztor

## **Letero de nia leganto el Niĵnij Tagil**

Kara s-ro Laszlo Pasztor!

Vi povas vidi malsupre la paĝon pri nia klubo

[www.k9698.narod.ru](http://www.k9698.narod.ru) kaj la informon pri renkonto por ĉiuj, kiuj volas partopreni ĝin en aŭgusto en 2009a.

[www.kpc2008.narod.ru](http://www.kpc2008.narod.ru)

Kun bondeziroj – Larisa kuzmenko el N.Tagil

### ***Saluton, karaj geamikoj! Bonvenon al nia urbo!***

La urbo N. Tagil situas en la Sverdlovska regiono, en la meza Uralo. Ĉirkaŭ la urbo estas malaltaj montoj kovritaj per arbaroj. En arbaroj kreskas betuloj, altaj pinoj, abioj kaj aliaj arboj. Precipe belaj estas arbaroj aŭtune, kiam folioj estas flavaj, ruĝaj, brunaj...

Vintre homoj de nia urbo ŝatas skii sur la malaltaj montoj kaj apud la urbo troviĝas fama skiejo.



Vi vidas la Draman Teatron de la urbo N. Tagil



### Pri historio de nia klubo

Esperantoklubo en nia urbo estis fondita en 1985. Tiam jam kelkaj homoj finis Esperantan korespondan kurson. Inter ili estis Boris Tjutrin, Valerij Borodin, Larisa Kuzmenko kaj Lidija Jerofejeva. Larisa finis korespondajn Esperanto-kursojn (komencantan kaj daŭrigan) ĉe la Moskva Esperanto-klubo (ĝiaj instruistoj estis Irina Basko kaj Vladislav Zibenkes).

La aliaj finiskursojn ĉe Ufa kaj Zaporozje E-kluboj. La klubanoj lernis Esperanton per la lernolibro de Boris Kolker kaj uzis aliajn lernolibrojn. Kelkaj estontaj esperantistoj lernis la lingvon memstare. Nian klubon ni nomis « Renaskiĝo » ĉar en malnovaj lokaj gazetoj ni trovis interesajn artikolojn (« Tagiljskij raboĉij » la 19a de aŭgusto, la 28a de septembro, 1927) ke en nia urbo funkciis esperanto rondetoj kaj estis pli ol 15 esperantistoj en nia urbo. Oni informis eĉ pri la eldono de la nova esperantapoŝtmarko kun la portreto de Zamenhofo en nia lando. Dum okdekaj jaroj esperantistoj de nia urbo partoprenis diversajn renkontojn en Uralaj urboj – Sverdlovsko, Tjumeno, Miaso, Tobolsko, Ĉeljabinsko, Permo. En Permo oni aranĝis kelkajn fojojn interlingvistikajn konferencojn kaj niaj klubanoj ankaŭ partoprenis ilin. Tie ni povis renkonti faman esperantiston Boris Kolker.

*Komence en nia klubo estis 8 aktivuloj:*

**Boris Tjutrin (prezidanto), Lidija Jerofejeva (sekretario), Larisa Kuzmenko, Valerij Borodin, Valerij Malcev, Klava Ivanova, Nella Oreĥova, Vitalij Belmesov. Poste komencis studi Esperanton kaj finis la kursojn Svetlana Purtova, Tanja Degaleviĉ, Igor Ĥusanov, Valentina Pankratova, Lina Usova kaj Nadja Kotenkova.**

Evoluis kluba agado. **Lidija kaj Larisa** instruis Esperanton al gejunuloj.

**Vitalij** organizis novan rondeton en la Vagonka- distrikto kaj kelkaj lernantoj vizitis ĝin. Poste li devis forveturi el nia urbo kaj nun loĝas en Kovrov.

**Vladimir Viĉegjanin** venis al nia klubo komence de la 90- aj jaroj kaj fariĝis aktiva esperantisto. Li partoprenis multajn kongresojn de UEA, tradukis librojn kaj akceptis gastojn el eksterlande. Per lia agado ni povis komunikiĝikun eksterlandaj esperantistoj en nia urbo. Ekzemple, interese pasis la renkonto kun japana esperantisto en la redakcio de la loka gazeto "Pulsaro" en 2005.

Malfeliĉo nin trafis kiam mortis **Boris Tjutrin**.

Ni restis sen aktiva prezidanto. Vladimir prenis sur sin tiun funkcion, sed la klubo ne tiel vigle laboris. Nun kelkaj studentoj de la loka Pedagogia Akademio de nia urbo havas intereson pri Esperanto, lernas ĝin kiel nedevigan lernobjekton kaj necesas esperi, ke nia klubo denove renaskiĝos.

En aprilo 2008 ni aranĝis esperantan ekspozicion en la muzeo de nia akademio.

Tie oni povis rigardi esperantajn librojn, gazetojn, revuojn, metodikajn materialojn por lecionoj (bildoj, plakatoj kun gramatikaĵoj, ludoj), simbolojn de Esperanto, portretojn de famaj esperantistoj, fotojn kaj leterojn de korespondamikoj el pli ol dudek landoj.

La tutan semajnon en la muzeo sonis Esperanto-kantoj.

La malfermon de la ekspozicio vizitis esperantistoj el Jekaterinburgo kaj studentoj preparis malgrandan koncerton.

[www.k9698.narod.ru](http://www.k9698.narod.ru)

## **INTERNACIAJ ESPERANTO-TAGOJ EN N.TAGIL EN LA JARO AŬGUSTO 2009-A**

**La grupo de esperantistoj de la N.Tagila klubo helpe de la rusa-germana Asocio de amikeco organizas la 1-16 an de aŭgusto 2009 en la urbo N.Tagil (Uralo)**

**INTERNACIAJN ESPERANTO-TAGOJN dediĉitajn al la naskiĝo de la urbo.**

**Ni atendas esperantistojn el la tuta mondo partopreni niajn aranĝojn.**

**Temo: "AMIKA RONDO en N.Tagil"**

**Internaciaj E-tagoj en la urbo N.Tagil estas organizataj de la loka Esperanta klubo helpe de la urba rusa-germana Asocio de Amikeco.**

**La urbo N.Tagil estas la dua granda urbo en Sverdlovska regiono (Meza Uralo) kun la ĉefa urbo Jekaterinburgo. En ĝi loĝas proksimume 350 000 homoj.**

**La renkonto okazos en aŭgusto ĉar en la monato la urbo festas sian naskiĝon kaj festoj okazos en ĉiuj distriktoj de la urbo.**

**La unuan sabaton de la monato kutime okazas promenado sur la Lisja (Vulpa) monto kiu havas malnovan gardoturon kaj de kiu oni povas vidi la tutan urbon kun bela lago en la centro, teatro, pĝejoj kaj verda parko kun fontanoj kaj karusejoj. Dum la tago el la centro de la urbo homoj en belaj vestaĵoj iras kun muziko al la monto kaj ĝas sur la monto feston kun ludoj, kantoj, dancoj, ekspozicioj, foiro. Ankaŭ ni planas partopreni en la procesio, uzante nian lingvon.**

**En la urbo ni vizitos ankaŭ muzeojn inter kiuj estas tre unika muzeo de metalaj pletoj.**

**Dum la tagoj esperantistoj ekskursos (ekskursgvidantoj estas esperantistoj!)**

ankaŭ en la apudajn urbetojn de nia Sverdlovska regiono – Nevjansko, kie ni vizitos klinitan turon, la mirindan muzeon de pasinteco, veturos por du tagoj en la urbon Verhoturje kie estas monahejo kun rekonstruitaj pajejoj kaj vizitos Visimon, kie estas belega naturo kaj proksime estas la limo inter ŝtato kaj Azio.

Certe ni organizos por esperantistoj interkonan vesperon, vesperojnĉe la fajro kun bakita terpomo, estos kantajn kaj ludajn vesperojn, metiejojn kun farboj kaj argilo por tiuj, kiuj ŝatas arton.

Krome ni planas paroligajn kursojn por komencantoj kaj renkontiĝojn kun interesaj homoj – pentristoj, ĵurnalistoj, bibliotekistoj. Ni esperas ke vi povas rakonti al ni pri viaj hobiaj kaj kutimoj de via popolo, via urbo kaj, se eblas, bonvolu preni viajn aĵojn kaj fotojn de viaj hejmaj lokoj – ni faros ekspoziciojn!

Bonvenon al nia gastama urbo!

Nian urbon vi povas atingi per elektrovagonaro (tri horoj) , buso aŭ itinera taksio el la urbo Jekaterinburgo, kien venas multaj trajnoj el Moskvo kaj aliaj grandaj urboj de Rusio. Se vi flugos al Jekaterinburgo vi povas veni per buso aŭ itinera taksio de la aerodromo “Kolcovo”. El Moskvo vi povas veni per rekta trajno “Moskvo-N.Tagilo” dum 1,5 tagoj.

Por loĝado vi povas elekti:

La plej malmultekosta loko -150 rublojn (4,5 eŭroj)/tage en studenta domo (po du homoj en ĉambro kun necesejo kaj duŝejo sur ĉiu etaĝo).

La urbaj hoteloj proponas nur multekostajn lokojn -1500 rublojn (45 eŭroj)/tage – luksaj kondiĉoj.

Manĝado estos en kafejo (matene- 150 rublojn, tage -250 rublojn, vespere – 100 rublojn). Vi povas manĝi memzorge.

Se vi bezonas oficialan inviton ni sendos ĝin al vi. Bonvolu informi pri via alveturo antaŭe.

**Kontaktaj adresoj kaj telefonoj:**

Ni akceptos la gastojn je la adreso: strato Gazetnaja 72/16 (du haltejoj per tramo de stacidomo, haltejo “Rinok”), [klarisa8@yandex.ru](mailto:klarisa8@yandex.ru) (Larisa), hejma (83435)-44-04-20 (German Shirokov respondecas pri loĝado)

Ni renkontos vin ĉe stacidomo en N.Tagil, se vi anticipu informos.

Atendas vin en la gastama urala urbo!

[www.k9698.narod.ru](http://www.k9698.narod.ru)

[www.kpc2008.narod.ru](http://www.kpc2008.narod.ru)

## Hungaraj popoldiroj

*Kiu diras "a", diru ankaŭ "b". Kiu levis la piedon, devas ekpaŝi. Se vi prenis la violonon, prenu ankaŭ la arĉon.*

*Kara estas la dono en minuto de bezono. Kiu donas rapide, donas duoble. Rapida dono, duobla bono.*

*Kiu akceptas donacon, perdas la pacon. Kiu donacon prenas, tiu sin katenas.*

*Li salutas profunde kaj mordas hunde. Ĉe tro ĝentila ekstereco mankas sincero.*

*Amiko fidela, estas trezoro plej bela.*

(Csiszár Ada-Kalocsay: Domfabriko/6000 popoldiroj-esprimoj/HEA)



Sonorilturo de la Reformata Preĝejo sur la monto Avas

**JULIO NOVOTNY**

**LA AVAŜ - MONTA PREĜEJO**

**Kunlaborantoj de la hungarlingva eldonaĵo estis:**

La hungarlingvan eldonon lektoris: Géza Entz

Jozefo Szabadjfalvi

Redaktoro: Julio Novotny

Teknika redaktoro: Georgo Ducsai

La fotojn preparis kaj la kovrilon planis: Ede Valent

ISBN 963 00 0523 9

Eldonas la Avaŝ-monta Kalvinana Eklezio

Respondeca eldonisto: Julio Novotny

Prepariĝis ĉe la Borŝod-departementa Presindustria Entrepreno.

Respondeca direktoro: Adalberto Kilián

**Esperantigis:** Ladislao Pásztor – Miskolc, Hungario

**Reviziis:** Attila Makay – Oradea, Rumanio

## **PARTO IIa**

-daŭrigo -

### **ESTIĜO DE LA NUNA PREĜEJO**


#### **Diversopinioj ĉirkaŭ la konstruado de la nuna preĝejo**

Ni jam havis kelkajn 15-jarcentajn indikojn, sed nek ĉi tiuj donas fidindajn indikojn pri komenco kaj finiĝo de la konstruado. Laŭ unuj, la ŝtonskulptaĵoj, ĉefe deklivoj de la pilierplintoj devenas verŝajne el epoko de Sigmundo. Do, ĉirkaŭ la 1400-aj jaroj komenceblas la konstruado. / L. Marjalaki Kiss. / Ĉi tiun ebligis, la relative trankvila situacio; la turkoj ne molestis la landon, estis karakteriza la altiriĝo pri la eklezio kaj la financa prospero.

En 1929 Ludoviko Marjalaki Kiss, en lia verko skribis la sekvajn: „Kiam konstruiĝis la Avaŝ-monta preĝejo?” „Post 1365 dum kelkaj jaroj la burĝaro de la urbo komencis konstrui al urbo indan novan grandan preĝejon. Ĉi tiu grandmezura preĝejo konstruiĝis sur altaĵo super la urbo, sur deklivo de monto Avaŝ dum plur- jardekaj laboroj sub la regado de reĝo Sigmundo. Oni komencis uzi ĝin ĉirkaŭ la jaro 1400. Ĉi tiun pruvas pentrita surskribo sur iun originalan muron. Ĝin oni trovis sur la norda muro, okaze de la 1924 jara purigado. Ĉi tiu skribaĵo forte malboniĝadis dum multe da jaroj, sed la sur tiu estantan 1402 / MCCCCII /jarnumeron, mi povis deĉifri okaze de restaŭrado.” / L.Marjalaki Kiss, 1927. 6./

„Do, la 1402-a jarnumero estas akceptebla pruvado, kiun fortigas : la sur fostoj videblaj lilioj, la pintoarka / gotika / strukturo kaj *lâvâzic* -formaj fenestrovitroj. Ĉi tiuj faktoj pruvas tion, ke la konstruado de Avaŝ-monta preĝejo okazebis ĉirkaŭ 1400, dum tempo de regado de reĝo Sigmundo.”

„Se iu tamen povus dubi pro tio, diras Ludoviko Marjalaki Kiss, ke la konstruado okazis pli malfrue, por konvinki tiujn, li aludas al privileglerito (al)de reĝo Sigmundo datite en 1411:



Interno de la preĝejo

Nome la rajtojn de rezervo kaj libera pastroelektado deŝkolice a burĝaro konstruita preĝejo, por eterne donacis al Konsilantaro de Miskolc, / L. Marjalaki Kiss, 1927. 6. /, kiun reĝino Maria renovigis en 1523. La menciitan privilegieron ankaŭ ni komunikas laŭ traduko de Menyhért Zalán:

„...eĉ ni konsentas kaj permesas de nia reĝa respekto kaj de nia letero kaj se malpleniĝus la nun ne delonge fondita preĝeja paroko, kiu estiĝis je estimo de reĝo Sankta Stefano kaj kiuj ajn dezirus dungi kiel parokestro, ĉi tiun rajton Miskolc eterne rezerveblas. Sur tiun leteron estas premite tiu sekreta sigelo, kiun mi uzas kiel reĝo de Hungario, ktp.

/ L. Marjalaki Kis, 1927. 7. /

Do, la privilegiero mencias la preĝejon kiel, ne delonge konstruita. Ĉi tiu indiko refutas tiujn asertojn, laŭ kiuj, la preĝejo konstruiĝis jam en la 14-a. jarcento. Ankaŭ la menciita privilegiero perfidas, ke ne temas pri restaŭrado, sed pri nove fondinta preĝejo – konstatis Ludoviko Marjalaki Kiss – kiu gardas de la unua/j/ preĝejo/j/. nur la bazon, la titolon Sankta Stefano kaj la pilierojn de meza halo.

En la eseon resumanta parto temas pri iu konstato: „Do, granda preĝejo de Miskolc konstruiĝis ĉirkaŭ 1400 ne pro reĝa favoro, ne pro terbienula donaco, sed rezulte de persista oferado de la burĝaro. / L. Marjalaki Kiss. 1927.7. / En alia eseo, Ludoviko Marjalaki Kiss pli malfrue, revizianta sian opinion, tiun skribas, ke: „la strukturo, interna elformigo kaj skulptitaj fostoj kaj fenestroformoj de la preĝejo; temas pri tio, ke jam pasis ankaŭ mezo de la 15-a. jarcento, kiam pretiĝis ankaŭ la interna meblaro. La lasta laboro estis la pentrado de la muroj. / L. Marjalaki Kiss. 1936.12.15. /

En 1926, dum oni malkonstruis, la lignotriforion de la norda flanko /ni prezentas la nordan triforion figurantan iaman foton /nome, okaze de la senpolvigo de la plafono, de kie konstante falis la polvo/, oni trovis sur norda flanko de la interna tereno je dek metra alteco latinlingvajn

tekstofragmentojn. Tiutempe oni ne donis gravan signifecon al la fragmentoj kaj nek ebleco estis al la esploro. Ferenc Szabó somere de 1936, kun socia kunteno kaj kun eklezia financado, komencis fari kun siaj kelkaj amikoj / Andor Leszih, Adalberto Demes, Ludoviko Marjalaki Kiss, Géza Megay. / la necesan trabaron. Ili forigis la malpuraĵojn kaj kalkomakulojn. Post la konservado kaj fotado, kiun faris Géza Megay evidentiĝis, ke la teksto forte malboniĝis. La pereon helpis la jarcentoj, la dek jaroj sen konservado kaj ĉefe la incendio. Post la incendio la konstruaĵo ne havis tegmenton, ĉi tiel la vetero pereis ĝin.

La tekstofragmento havas 15.- jarcentajn, gotikajn 15 cm-ajn minusklojn en kvar skribitaj vicoj. Originala foto de la tekstofragmento estas videbla sur la 22. paĝo. La tekstofragmento estas la sekva:



**KÉP:**

I.anno / incarnationis / 1489 / die / m artis / ilico /

II....T / mathei / ,initum / ? / ....t / ..a...n / hec /

III.ecclesie / miranda / ? / ? / ? / ? / ? / sctus

IV? / johannis / arti / ? / .ili.io / ..ion / ? /

La interpretebla parto estas laŭ traduko de Gaspar Klein: „ en jaro 1489 de la enkorpiĝo de la vorto dum tago de Marŝ / ? / , marde, ĉi tie....”

Do, laŭ instruado de la surskribo, la pentrado de la preĝejo okazis en 1489 dum regado de reĝo Matiaso. Sed el la teksto ne estas evidenta, ke en 1489 vere la unua pentrado estis kaj la tuta preĝejo pretiĝis ĝis la konsekro, aŭ ripetante iun renovigon oni faris pentradon. En la kvara vico estas legebla la „johannis” nomo, kiu koncerneblas al iu pastro Johano. /

L.Marjalaki Kiss.1936.12. / laŭ Marjalaki, ĉar laŭ tiamaj notadoj, la Avaŝ-monta Sankta Stefano katedralo havis Johano pastron en 1489-1504.

Same koncerne la jaron 1489, li tiris la konkludon, ke en dua vico de la teksto estas legebla la „mathei” vorto, kiu koncerneblas al la reganta reĝo Matiaso. / L. Marjalaki Kiss. 1936. 15. 13. laŭ helpema komunikado de Géza Entz la vorto „mathei” signas nomon Máté./ Laŭ lia vidpunkto en Miskolc estis ebleco por konstrui preĝejon, ĉar la gildoj forte prosperiĝis kaj havis gravan rolon en vivo de la urbo.

Okaze de la preĝejrenovigo en 1941, Marjalaki komunikis publikaĵon en la miŝkolca „Magyar Jövő” /Hungara Estonto/ titola gazeto / „Figyelő” – Atentanto-: Magyar Jövő-4. nr.jan.1940. / pri la preĝejo kaj ties konstruadtempo; laŭ ĝi, la konstruadon oni finis en 1331, respektive en 1411.

Post unu tago en sama gazeto aperis iu aldona rimarko per surskribo „Figyelő” / Atentanto / sub titolo „Kiam konstruiĝis la Avaŝ-monta preĝejo?” efike de lia komunikaĵo. / Figyelő: Magyar Jövő ,5.nr. jan. 1940./ Ĉi ties kelkajn konstatojn ni citas: „Sendube estas, ke ambaŭ konstatoj estas eraraj. La arkitekturaj formoj, fiŝvezikformaj fenestroj kaj la volbaĵformigoj de la preĝejo; okazebis en la malfrua gotika epoko. Ĉi tiel la tempo de estiĝo de la preĝejo verŝajne okazis en la fino de la 15-a. jarcento.

„La eksterordinara plandeseĝnaĵ-aspekto de la preĝejo donas pli fidindan apogpunkton koncerne la konstruadtempon de la preĝejo, laŭ la gazeto „Atentanto.” Nome, nia preĝejo apartenas al la maloftaj preĝejoj, kie la sanktejon eblas ĉirkaŭiradi. Ĉi tia elformigo troveblas ankoraŭ krom preĝejo de Avaŝ en Nigrapreĝejo de Braŝovo,(RO) en la budapeŝta Intern- urba preĝejo kaj en Katedralo de Eger. Ĉi tiu elformigo estas ofta en eksterlando, ĉefe en Germanio. Iliaj plandeseĝnaĵoj estas samaj al la plandeseĝnaĵo de la Avaŝ-monta preĝejo! Ĉi tiuj preĝejoj konstruiĝis en la jaroj 1445-1460.

Se nun ni konsideras tiun cirkonstancon, ke la diversaj arkitekturaj stiloj alvenis al ni de eksterlando, sed ĉe ni tiuj aperis nur post duonjarcento, tiam ni povas aserti, ke antaŭ la jaro 1450, oni ne komenceblis al konstruado, Sekve ĝi okazeblis fine de la 15-a. jarcento, aŭ komence de la 16-a. jarcento....Nature, ankaŭ alia preĝejo ekzistebis sur loko de la nuna, kiu povis pereii. Eĉ la nuna preĝejo havas iun parton, kiu estas pli malnova. Ĉi tie la gazeto „Atentanto” aludas al Stefano Möller, laŭ kiu la pilieroj kaj ties plintoj devenas el la jaro 1380. Kial oni daŭrigis nur post cent jaroj la konstruadon? Tiun ĉi demandon ne eblas teknike respondi.”

Estas bezonata citi por informigo, el artikolo de gazeto „Atentanto.” : Nature estas, kiam ni parolas pri la preĝejo, kie la sanktejon eblas ĉirkaŭiradi, ke la nuna preĝejo originale havis tute alian formon. Sur lokoj, de nunaj dikaj pilieroj, staris originale, maldikaj okangulaj pilieroj ĉirkaŭ la sanktejo. Sed ĉi tiuj pli malfrue pereis.” /Atentanto:Hungara Estonto 5.nr. jan. 1940. /

La „Atentanto” havas interesan opinion pri la orgentriforio, kiu konstruiĝis en 1895. / ĉi tiu estas ankaŭ alies opinio! /Nome ĉe la konstruado oni ne konsideris lokojn kaj mezurojn de la originala triforio. Ties spuroj ankaŭ nun estas videblaj. Laŭ la pozicioj de pilieroj de la ĉef,- kaj flankonavo kaj la duontranĉado de la flankonavo ne estas laŭstilaj.

Laŭ vidpunkto de Stefano Möller:” Tiutempe ĝi konstruiĝis laŭ malfrua- gotika stilo kiel tri- nava halo-preĝejo:, per el - ŝtonoj skulptitaj pilieroj, per modluraj volbaroj, kun interna ĥorejo. La muroj estis ornamitaj riĉe de freskoj, de brilantaj internaj garnadoj. Kiuj estas ankoraŭ el ĉi tiuj? Nur la pereon citantaj spuroj./ S.Möller. 1925.10. /

Do, Stefano Möller konstatas tion, ke la preĝejo konstruiĝebis en la 15 -a. jarcento en la nuna formo, laŭ la detaloj per la ĉirkaŭirada ĥorejo.

Interesa estas la konstato de pli juna Jozefo Csemegi koncerne la konstruon kaj aĝon de la preĝejo. Laŭ li la preĝejo konstruiĝis en sama konstruepoko, ĉar la supervidaĵaj mezuroj estas samaj al krejoj de Hans Stethaimer, kiu fondis la „lernejon de Landshut”. Sed li esprimas ankaŭ tion, ke nur efiko de la menciita skolo estas videbla el bazplano de la preĝejo. La daton de la konstruo ni devas serĉi nur pli malfrue. Li fortigis ĉi tiun vidpunkton ankaŭ tiel, ke efiko de tiu skolo dum generacioj estis tre forta. Sudgermanaj antaŭbildoj de la preĝejo devenas el unua duono de la 15-a. jarcento. Ĉi tiel konstrutempo de la preĝejo estebilis meze de la 15-a. jarcento. La samon li konstatis pri esploro de la detalformoj.

Koncerne la stump-turon, li konstatas, ke ĝi estis ligite kaj de nordo kaj de sudo al la preĝejtereno. Ĝi havas saman altecon kaj ĝiaj du ejoj estas najbaraj (per)kun du ejoj de la preĝejo. Sur la stump-turo ni vidas gotikajn fenestrojn de la preĝejo. Ĉi tiu montras (tiun), ke iam ĉi tiuj muroj staris libere kaj la planisto de la nuna preĝejo konsideris ĉi tiun ekzistantan konstruaĵon. / J. Csemegi. 1937.255-259. /

Dum la studado de historioj de la preĝej-apudaj kapeloj – kiuj konstruiĝis je estimoj de Sankta Mikelo ĉefanĝelo kaj ĉieliro de Virgulino Maria – László Keszi Kovács trovis tiun ĉarton, (en lia pri kapeloj skribita studado), kiu donas signifajn indikojn al arkitekturhistorio de la preĝejo de monto Avaŝ. La rajton de konstruo kaj favorsinjoreco /L.K.Kovács. 1972. 56. / por Sankta Maria kapelo, ricevis iu riĉa, diligenta homo, Stefano Kowách el Hejőcsaba de la urba Konsilantaro. La donacanta ĉarto latinlingva estis, datite en Miskolc en jaro 1489 de Dio, post festo de Baptanta Sankta Johano en vendredo / la 26-an de junio / per subskribo de notario, Paulus de Kamancz. El hungara traduko de la ĉarto ni citas la aldonajon al la preĝejo de monto Avaŝ: „...ni permesis al sinjoro Stefano Kowách...ke por konstrui kapelon kune kun sinjoro Mikelo Themészváry, estimata framasono,, nia parokestro laŭrkrona, kiu kun ni planis kaj komencis konstrui de la bazoj nian Sankta Stefano preĝejon kaj menciitan kapelon...” / L.K.Kovács. 1972. 56. /

Laŭ ĉi tiuj ni konas la nomon de planisto kaj konstruestro de la preĝejo, kiu estis Mikelo Themészváry, tiama parokestro. / L.K.Kovács. 1972. 58. / La dato de ĝia konsekro estas laŭ la ĉarto: 26 junio 1489. Super gotika pordo de norda enirejo de la preĝejo estas videbla la 1924-a jarnumero, kiun oni klarigis nur en 1936. Sendube estas akceptebla tiu vidpunkto, ke en 1489 estis konsekro de la preĝejo kaj kapelo samtempe. Ludoviko Marjalaki Kiss (tion) konstatas pri la nomo Johannes, ke tiu estas nur nomo de tiama pastro de la preĝejo, sed pri kiu jam ni scias laŭ la menciitaj, ke tiu estis alia. Laŭ László K. Kovács ĉi tiu aludas al Baptanta Sankta Johano. /L.K. Kovács. 1972.60. /

### **Pereo Kaj Nuna Formo De La Preĝejo**

Antaŭ ni povas paroli pri plej terura okazintaĵo, ni mencias, ke krom ekleziaj kredvivaj okazintaĵoj, ĉiuj pli gravaj publikvivaj kaj lernejoj festoj en la preĝejo okazis. El inter ĉi tiuj ni mencias du okazintaĵojn el vivo de la jarcento:

La unua okazis la 21-an de decembro 1541, kiam dum la de Georgo Fáter kunvokita kunveno, la reprezentantoj de nobelaro de 13 fortikaj-departementoj, deklaris siajn alkroĉiĝojn al reĝo Ferdinando kaj samtempe esprimis siajn insultojn pro senindulgaj despotismoj de la potencadaĉefnob eluloj, ĉar ili molestas la et-nobelaron. /J. Szendrei. 1890.105./

La alia grava okazintaĵo datiĝis en 1596, kiam post malvenko de Eger kaj post detruo de nia urbo; niaj superuloj kaj maljunuloj la praa kutimo, kunkolektiĝis en la Avaŝ-monta Sankta Stefano-preĝejo por konsiladi pri reorganizadoj de la ruinigitaj kaj detruitaj urboj.

/ J. Szendrei.1890. 117. /

En la 16-a. jarcento okazis multe da malgajaj eventoj. Ĉiujn mizerojn ek de la katastrofo ĉe Mohács, la je tri- parta dispecitigo de la lando; simbolas la sorto de la, forbrulita kaj dum dudek jarojn sen tegmenta, en 1544 pereiganta preĝejo. Kiu estis la antaŭaĵo?

Ni legas en historia verko de Borovszky la sekvajn: / A.Borovszky. 1909. 39. /

Mehmet paŝao de Buda, de komenco de la 1540-aj jaroj, multfoje kaj vane mesaĝadis al la miŝkolcanoj por sendi al sia armeo diversajn manĝaĵojn, produktaĵojn, brutojn. Pro la granda distanco ĉefoj de la urbo tute ignoris la postulojn. Ĉi tiu sinteno naskis venĝon kaj la paŝao en aŭgusto de 1544, per propra 8000 persona armeo, ekiris al Miskolc por venĝpuni, elrabi kaj ostaĝigi, dume ĉion forrabante, forbruligante kaj pereigante. La tiama skribĉi tiel rememoras pri la militiro: „ De tie li forportis kvarmil malliberulojn kaj sennombran bruton”. La pereigo estis grandioza la popolo de 45 vilaĝoj kaj urboj sentis ĝian efikon ankaŭ en 1550.

En historio de la preĝejo la plej emociiga evento okazis, aŭtune en 1544, kiam armeoj de Mehmet paŝao aperas en la urbo kaj detruante, forbruligante la urbon atakis ankaŭ la preĝejon kaj – laŭ la tradicio - de loĝantaro tien savitan nutraĵon forrabante; pro venĝo, ankaŭ la preĝejon ekbruligis. Tiutempe forbrulis unuafoje kaj laste la romkatolika liturgia grandpreĝejo. Samtempe ties turo terenfalas deŝirante la gotikan volbaron de la 3 navoj; neniigante ties internan meblaron, altaron, statuojn kaj sanktajn bildojn. Parton de ili forigis kaj aliformis por puritana kaj simpla ceremonio Matiaso Dévai Biró la fama reformatoro, jam en 1543, – do antaŭ forbrulo de la preĝejo. –. Pri tiu ĉi terura katastrofo ne restis notadoj.

Johano Szendrei en lia granda miŝkolca monografio ĉi tiel resonĝadis la valoraĵojn, belecojn de la interna meblaro: „En la preĝejo, laŭ mezepoka arta spirito, estis pentrite per brilantaj koloroj la bildoj kaj relikvoj, kiuj pendis sur la skulptitaj kaj orumitaj altaroj. La ĉefmuraj freskopentraĵoj figuris, aŭ hungarhistoriajn temojn, aŭ malnovajn hungarajn sanktulojn, sed eblas, ke vivon de reĝo Sankta Stefano, kiu estis la unua hungara reĝo kaj figuris kiel patrono de la preĝejo. Detaloj de la freskoj estis videblaj en 1895, sed treege fragmente kaj la temo de la bildo ne estis konsiderebla. Ankaŭ la interna meblaro estis samkolora, ja al ties preparo reĝo Ludoviko la Granda kaj sia filino reĝino Maria kaj reĝo Matiaso el Diósgyőr donace kontribuis per riĉaj donacaĵoj. La menciitaj, multfoje venis por preĝi en ĉi tiu preĝejo.”/ J. Szendrei. 1890. 30. /

Esplorante historion de la preĝejo post la incendio, por komprenigi la okazintaĵojn, ni devas diri kelkajn aferojn.

Latifundio de Diósgyőr estis de 1515 kaj dum la tuta jarcento privata posedaĵo. Ĉi tiu fakto donis eblecon al persona monavideco kaj al misuzoj. Ĉi tia posedanto estis Sigmundo Balassa, ĉefjupano kaj lia edzino, Borbála Fánchy, kiuj aĉetis la fortikaĵon de reĝo Ferdinando la I-a, en 1540, kontraŭ 20000.- forintoj. La vidvino Borbála Fánchy, plie ol ŝia edzo brutale persekutis, molestis luteranajn kaj reformatajn burĝojn de la urbo per ŝia perforteco, religieco, blinda fervoreco. Kiam la preĝejo forbrulis, ŝi ne financis bezonatan monsumon por la renovigo /al la lignomaterialoj, ŝtonoj, kalkoj./, kaj ŝi lasis perei la sen -tegmento restitan preĝejon. Kion la incendio ne perei, tio iĝis viktimo de brutaleco de Borbála Fánchy. Ekrestis la okangulaj skulptitaj pilieroj sub la volbaro kaj la tre valoraj murbildoj, freskoj kaj ceteraj. Nur tiam ŝanĝis ĉi tiu terura situacio, kiam Borbála Fánchy la 5-an de februaro 1563 mortis. Tio estas certa, ke en la 1544 forbrulita kaj sentegmenta preĝejo ankoraŭ en 1563 estis en ruinoj. Tiun ĉi fortigas tiu „plendoletero”, kiun juristo kaj burĝoj de la urbo sendis al la reĝo Ferdinando la I-a, kaj ili petas lian reĝan moŝton, ke ilian ruinan preĝejon povas renovigi.

/Landa Arkivo. Neo. Reeg..Acta.F. 723.Nr. 91./ Ili esprimis tion, ke alkroĉiĝas laŭ la privilegio, kiun Sigmundo donis al la urbo, la posedaĵo de la preĝejo, eĉ ili postulas reen ankaŭ hospitalon de Mindszent kaj ties kapelon, en kiu kiel vicparokestro iu delegitfratulo celebris meson. Kiel respondo al la letero, unu post alia alvenas la reĝaj permesiloj, de reĝoj Ferdinando la I-a kaj de Miksa, por certigi liberecon de loĝantoj de la urbo, liberajn funkciadojn de la gildoj, el la fortikaĵarbaro hakadon de la arboj. Kaj hejmenportadon kaj liberan produktadon de la hardebakita kalko. Burĝoj de la urbo ricevis sufiĉan kompenson, kiun devas pagi heredantoj de Borbala Fánchy, Johano Fánchy kaj Georgo Fánchy.

### **La Preĝejo Havos Reformatan Ceremonion**

Dume ĉirkaŭ la preĝejo okazas gravaj eventoj, kiuj kaŭzas senpopoliĝon de la romkatolika eklezio. Márton pastro de la preĝejo, printempe de 1531 mortas, dume li batalas kontraŭ kreduloj de la reformacio. Tomaso, episkopo de Eger tuj disponas, sendi pastron al la reformacio Di-servo - amika ĉeestantaro, kiu estis malzorgita pro malsano de Márton pastro.. Sed li renkontiĝas kun du kontraŭkandidatoj, Nikolao Oláh, grandpotenca kanceliero kaj Sebestyén Pemfinger ĉefĵupano, kiuj dezirus okupi la malpleniĝitan lokon /P.Árday, 1913.14./ Sed estis iu tria problemo, ĉar la urbo havis pastroelektadan privilegion. Kiam printempe de 1562 Johano Várallyai, delegito de episkopo de Eger, franciskano, vicparokestro, venis por helpi al Borbala Fánchy Balassa en kontraŭstaro kontraŭ la protestantismo, tiam jam la konventiĝo estis grandmezura. Pro tio en 1566, de Urba Konsilantaro elektita, bonkapabla Mikelo Hewessi, predikato - kiu estis disĉiplo de Fülöp Melanchton - devis fari nur organizon al eklezio.

En preparo de reformacio de la urbo, Petro Perényi, ĉefnobela korpogardisto havis gravan rolon. Ties posedaĵoj situas ĉirkaŭ Miskolc duonronde, kaj li havante interrilatojn kun la kreduloj de la reformacio kaj kun, al li apartenantajn vilaĝojn; li invitis protestantajn pastrojn kaj protektis ilian funkciadon. Verŝajne ankaŭ Matiaso Dévai Biró, helpe de Petro Perényi alvenas al Miskolc en 1543, kiu hungare, laŭ spirito de la reformacio, diras vorton de Dio en la Sankta Stefano Grandpreĝejo. Kvankam li post unu jaro, en 1544 jam en Debrecen anoncis vortojn de Dio, sed estas jam posteulo, en la persono de Gregorio presbitero, pri kiu ni ankoraŭ parolos.

La sub protekto de Petro Perényi elformita protestanta etoso, efikis stimulantante pri tio, ke la loĝantaro iĝis unue luteranreligia, pli malfrue kalvinanreligia kaj ĉi tiel iĝis la preĝejo kalvinan- karaktera.

### **En La Renoviĝanta Preĝejo - La Vivo Vigliĝas**

Post tre malfacilaj jaroj, la reakiro de la uzurpitaj havaĵoj, la ebleco de mastrumado por burĝaro, kaj la senobstakla funkciado de la gildoj; rezultis riĉiĝon de la loĝantaro. Pro tio estas bonhaveco kaj, ebleco por burĝoj, financi per monsumoj(n al) la komunajn taskojn kaj laborojn.

Ĉi tiel oni povis, dum kelkaj jaroj per grandioza fortostreĉo eble fini la preĝejrenovigon. Ĉi tiun fakton fortigas, la ekde 1569 skribita protokolo, en kiu jam neniam notado estas, koncerne la konstruon de la preĝejo. Sed inter 1569 kaj 1721, la protokolo, regule fiksas tiujn okazintaĵojn, kiuj temas: pri riparo de preĝejo, pri ŝindofarado, pri renovigo de preĝejaj seĝoj, pri elektadoj kaj salajroj de preĝejaj dungitoj. Ne temas en la protokolo pri sonorilturo-konstruado aŭ rekonstruo.

Inter 1563 kaj 1569 ĉi tiel verŝajne la rekonstruo okazis. La ŝindojn sur la tegmento oni faras ĉirkaŭ po tridek jaroj; la jarnumeroj estas notite sur orienta parto de la preĝejtegmento per kuprociferoj. Ĉi tiuj ciferoj estas videblaj ankaŭ nun. / 1666, 1734, 1768, 1832, 1868, 1923, kaj 1980. / En 1923 la preĝejtegmento ricevis brunan ardezokovraĵon ne konvenan al preĝejo. / En la urba jarlibro - skribite la 1-an de julio 1597 - ni legas pri tio, ke ĉirkaŭ la preĝejo oni faras barilon. Nome estis kutimo, ĉefe en tempo de la turkaj patroladoj, sed ankaŭ pli malfrue, ke la loĝantoj de la urbo portis siajn valoraĵojn, kaj nutraĵojn en tiun ĉi preĝejon, por. / lardon, tritikon ktp. en kestoj/, ke ili estu en fortigita loko. En intereso de pli sekura gardo, oni faris ĉirkaŭ la preĝejon fortan palisaron.



Restaŭrita stanoĉambrego de la per bruna ardeztegolo kovrita preĝejo./

### **La Eventplena 18-a. Jarcento**

#### **L a Socialaj Demandoj Retroviĝas**

Ankaŭ la vivon de la preĝejo determinas lakontraŭreformacia movado de la 17-a. jarcento. En la urbaj jarlibroj - kiel ni menciis jam - nur pli malgrandaj riparoj estis menciitaj. Kvankam la urbo ekzercas ankaŭ pli malfrue siajn favorsinjorajn rajtojn modeste, sed pli grandajn kostojn neniu entreprenas, en la jarlibroj ĉi tiaj menciadoj ne estas.

En la 18-a. jarcento jam plie estas notadoj pri multe da aferoj. En la 1770-aj jaroj oni faras grandiozan rekonstruadon. Kaskon de la turo oni malkonstruas, ĉar forte malboniĝis, kaj rekonstruas el nova materialo. La eksteran muron de la preĝejo oni denove morteras, ties internan muron purigadas. La malboniĝitajn benkojn de la junularo sur la triforio oni ŝanĝas, riparas. Estis bezonata pli grandioza renovigo, ĉar en la antaŭa jarcento la popolo apenaŭ povis entrepreni oferon por sia preĝejo, por ekleziaj konstruaĵoj, spite al tio, ke la

ĉeestantaro de Di-servo konstante pligrandiĝis. La eklezia protokolo entuziasme skribas, ke „la multe da homoj ne povas enteni la grandpreĝejon!” / Ejkv.1770.I.k.525. /

Efike de tiu, oni pensas unufoje pri konstruo de dua preĝejo, sur la strato Kossuth- kaj komencas la organizadon kaj mono-kolektadon. La animajn pretendojn oni klopodas kontentigi tiel, ke pliiĝas la nombrojn de D-servoj kaj pensas pri tio, ke „estu tri kultoj.”

Dum la 1768 - jara konsistoria kunveno, oni okupiĝas ĉefe pri sociaj demandoj. Multe da homoj vivas ekstere de azilejo, multe da homoj almozpetas sur ŝtuparo de la preĝejo, unu de alia kaptadas la almozon; kaj (i)tiel, oni apenaŭ povas eliri trans la pordego. Efike de tiu ĉi (i)oni decidas, ke faras kaj metas apartajn monokolektujojn por la malriĉuloj donendaj monsumoj.

/ Ejkv. 1768. I. 443. /

La zorgo ne ĉesas, ĉar oni devas ŝanĝi la ligno-strukturon de la malnova preĝejo.. Pro la konstanta renovigo la financo estas pli malmulte, ol la kostoj. Subtenado de la preĝejo estas zorgo de la Konsistorio. Inter ĉi tiaj cirkonstancoj oni ŝanĝas la malboniĝitan plafonon. Oni faras la novan laŭ tabula divido kaj pentras ĝin al blua.

Sur la plafono oni ne metas ornamajn motivojn. Do, la protokolo ankaŭ tion decidas, ke la nuna restaŭrita plafono ne estas la originala, ĝi ne estas 16. jarcentdevena.

Ĉi tiel estas komprenebla, ke la plej lastaj plafonesploroj de la Landa Artobjekta Inspektoro, ne trovis kolorajn motivojn, kiuj similas al koloraj motivoj de la preĝejo de Megyaszó. , kiel pli frue oni supozis kaj Szendrey asertis. Dato de la preparo estas 1778, ĉar dum la 1980-jara restaŭrado , meze de la plafono (estis)oni trovis eternigite la 1778-an jarnumeron./ Ejkv.1778.II.73. /

La demandon pri konservo de matrikuloj, protokoloj kaj leteroj de la eklezio, oni pritraktas en 1781, kaj konstatas, ke en la stumpa-turo estanta ferporda, senfenestra,ĉi tia ŝtela ejo estas sentaĝa, ĉar estas neaerumita. Pro tio estas bezonata por fari iun fenestron sur okcidenta flanko de la stumpa-turo, samtempe por fari iun sekuran ramplon. Ĉi tiel havi la preĝejo arkivejon. /Ejkv. 1781. II. 194./ La gotika fenestro prepariĝis laŭ la stilo de la preĝejo kaj estas videbla. ankaŭ nuntempe super la okcidenta enirejo en unu-etaĝa alteco

- ni daŭrigos -

## Informoj

**24—28. de junio 2009. Festivalo IRIS Interregiona, Internacia Esperanto-Festivalo**

Informoj ĉe Ferenc Harnyos [hferenc@pr.hu](mailto:hferenc@pr.hu)

**3-5 de julio 2009. Internacia Fervojista Esperantista Amika Renkontiĝo en Nyíregyháza**

Informoj ĉe Zengő Enikő, [enimy@freemail.hu](mailto:enimy@freemail.hu), tel: + 36-20-323-43-65

## Internacia esperanto-Konferenco de OSIEK en Hungario

18-24 en julio 2009, en urbo Kondoros, en sud-orienta Hungario okazos la konferenco. – La organizo OSIEK estas fondita por organizi ĉiujare internacian konferencon kun multaj prelegoj, programeroj. Ĉi tie oni voĉdonas ankaŭ pri la Premio OSIEK, kiu estas aljuĝata ĉiujare al vivanta verkinto pro sia ne-fikcia kultura verko. Ĉeftemo de la ĉi-jara konferenco estas:

"Humura literaturo en Esperanto") Pliaj informoj troveblas ĉe <http://www.osiek.org/iek/IEK-2009-alighilo.pdf>, aŭ ĉe Kozsuch Pál, 5553 Kondoros, Vasút u. 3. Tel: +36-66-388807, retpoŝto: pauljuno@freemail.hu

### **16-18. Julio 2009. Internacia Junulara Renkontiĝo KVAK**

Informoj: <http://kvak.esperanto.at/>

### **8-16. aŭgusto 2009. Esperanto Tendaro en la Karpatoj, je memoro de Milan Zvara!**

Informoj: : <http://orapordego.h.com.ua/milanzvara/>, aŭ ĉe la organizanto: Vladimir

Hordijenko, [volodomir@ukr.net](mailto:volodomir@ukr.net), p/k 35, Kijev-133, UA-01133, Ukrainio.

/laŭ [www.eventoj.hu/](http://www.eventoj.hu/)

### **Kultura Esperanto-Festivalo**

UEA kaj Esperanta Civito kune rekomendas la partoprenon en Kultura Esperanto-Festivalo

George Silfer de Esperanta Civito kaj Probal Daŝgupta, prezidanto de UEA, sekrete komencis dialogon kaj interkonsentis ke anstaŭtaŭ kontraŭbatali unu la alian ili deziras trovi la komunajn valorojn kaj trovi iun "venko/venko" situacion. Dum multaj jaroj ja estis konflikto inter Esperanta Civito kaj UEA, sed espereble blovas nun nova vento. Iom harzade George Silfer kaj Probal Daŝgupta trovis unu la alian en la laboro ke Barak Obama enkonduku Esperanton kiel fremda lingvo en la usunaj lernejoj. Montriĝis ke ili ambaŭ estas tre imponitaj de la kampanjo de Barak Obama "jes ni povas". Ili estas konciantantaj ke Barak edukiĝis kiel mediaciisto kaj impresis ilin ambaŭ la ideoj de tiu metodo solvi konfliktojn, interalie la nova ideo de venko/venko situacioj.

Rapide ambaŭ pensis pri Kultura Esperanto-Festivalo (KEF) kiujn ili ambaŭ partoprenis. Ili rapide komprenis ke jen estas komunuma afero por kiu ili ambaŭ povas labori kaj subteni. Afero kie ili ambaŭ venkas en la kunlaboro. Silfer jam partoprenis la unuan KEF en 1986 Upsala/Svedio ankaŭ ĉar ĝi ja iel baziĝas sur la Raŭma Manifesto malgraŭ ke la festivalo neniam aliĝis al la Pakto de la Esperanta Civito. Probal Daŝgupta venis al KEF en 2005 kiu okazis en Helsinko/Finnlando. Li venis kiel verkisto de originala esperanta literaturo ĉar antaŭ ol esti prezidanto de UEA Probal estis konata kiel unu el la plej rimarkindaj eseistoj en Esperantio pro la elstaraj formo, lingvo kaj ideoj de siaj tekstoj. Dum KEF en Helsinko li ne nur prelegis sed ankaŭ gvidis skribatelieron por la partoprenantoj. Ambaŭ opinias ke KEF certe estas unu el la pintaj aranĝoj de Esperantio, ĉar ĝi estas la loko kie vi plej bone povas konatiĝi kun Esperantokulturo. Ĝuste ĉar ambaŭ agnoskas kulturon kaj plej ĉefe ke ili agnoskas la gravecon de kulturo inter junuloj. Kiel ili skribas en ilia komuna komunikilo: "Ni ambaŭ devas konstati ke junuloj preskaŭ ĉie ajn en la mondo plej interesiĝas pri sporto, amo, muziko, filmoj, komiksoj k.t.p. Ĝuste la kulturo estas unu el la kampoj en kiu Esperanto plej bone evoluigis kaj atingis tre altan nivelon, kaj KEF estas la

aranĝo kie oni en praktiko plej bone montras tion." Dum la UEA estrarkunsido la 29an de marto 2009 la estaro aprobis la rekomendon kun granda danko alirpa opmort la KEF teamo  
1/4 - 2009  
www.kef.saluton.dk

## **Monofero malfermita fare de esperantistoj favore al senhejmuloj en Abruco / La agado de esperantistaj gejunuloj en Giulianova**

*ĵaŭdo 9a de Aprilo 2009 je 08:22*

Mi tuj tradukas kaj publikigas jenan artikolon de IEJ kaj IEF rilate la malfermon de monofero favore al la loĝantoj en Abruco:

"SOTTOSCRIZIONE ITALA ESPERANTISTA JUNULARO/ITALA ESPERANTO-FEDERACIO -  
"HELPE AL ABRUCO" / MONOFERO de Itala Esperantista Junularo / Itala Esperanto Federacio

(...) La okazintĝo (t.e. la tertremo) kaŭzis, interalie, la nuligon de la Internacia Junulara Festivalo 2009 en Giulianova (TE); la ejo kiu devintus gastigi la renkontiĝon estis utiligata por loĝigi maljunulojn senhejmajn provenantajn de la provinco de L'Aquila; la gejunuloj de Itala Esperantista Junularo kunhelpis postulante donadon de magovaroj kaj rimedoj por tuja bezono ĉe komercaj vendejoj en Giulianova. En la tagoj de mardo kaj merkredo (7-8/04), danke al la sindonemo de la ĝuljanovanoj oni rikoltis entute ĉirkaŭ 500 kg da pasto, 80 litrojn da lakto, 100 kilogramojn da enskatolitaj tomatoj kaj 200 kg da enskatolitaj ~~gajoj~~ kaj aldone rimedojn por tuja bezono por infanoj, kiel vindotukoj kaj homogenajoj".

Mi aldonas ke la okan de aprilo, vespere, furgono de Itala Sporta Centro (Teramo) ~~riĝis~~ la varojn rikoltitajn de la gejunuloj de IEJ kaj transportis ilin al la lokoj de la tertremo. La du organizoj malfermis monoferon favore al la loĝantoj frapitaj de la tertremo, jen la informoj por sendi monon:

Bankkonto	/	Conto	bancario:
Federazione Esperantista Italiana	-	sezione giovani, conto n.	932107
Landokodo	/	Codice	paese: IT
Kodo	/	Codice	BIC/SWIFT: MEDBITMM
Banko	/	Banca:	BANCA MEDIOLANUM
ABI:	03062	-	CAB: 34210
Ejo	/	Località	: Basiglio
IBAN:	IT84T0306234210000000932107,	CIN:	T
Pagmotivo / Causale versamento: "HELPE AL ABRUCO"			

Conto  
Causale: "HELPE AL ABRUCO"

UEA:

ieja-z

Ĉiuj gejunuloj, kiuj jam sendis antaŭpagon por la Internacia Junulara Festivalo 2009 en Giulianova, nuligita pro la utiligo de la festivalejo por gastigi la evakuitojn, povas kontribui kaj kunhelpi decidante ne rehavigi al si la monon de la ~~am~~ pago, sendante mesaĝon al la kasistino de IEJ Elina Koryak [elina.koryak@gmail.com](mailto:elina.koryak@gmail.com)

Ĉiukaze, la mondonantoj, kiuj deziras legi propran nomon (aŭ pseudonimon) en la paĝaro de IEJ, estas petataj komuniki la konsiston de la pagita mono al la adreso: [ijf.admin@esperanto.it](mailto:ijf.admin@esperanto.it)

Italaj Esperantistoj IEJ/IEF

## Gratuloj

Ni kaptas nun la okazon por gratuli la redaktarojn de la **100 jara** revuo: La Ondo de Esperanto, eldonita en (Kalininograd) Rusio, kaj al la **50 jara** revuo Israela Esperantisto, kiel organo de Esperanto – Ligo en Israelo. Ni dankas la el Tel-Aviv alvenintan speciale festan eksteran numeron de Israela Esperantisto, donacatan al EAR „Király Lajos”. La festa numero estas riĉenhava, tre plaĉeme aperinta, leginda, gratulinda.

Al ambaŭ redaktoj ni deziras pluajn eldonojn de sukcesegaj numeroj de ilia revuo.

Adri Pásztor

### "Kvardek jaroj de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

Nia Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo fondiĝis la 2-an de marto, en la jaro 1969. En marto de 2009, ni festis la 40-an naskiĝtagon de la Fakgrupo. Kvardek-jara agado de iu Medicina Esperanto-Fakgrupo estas raraĵo en la historio de la tutmonda Esperanto-movado”

Gedoktoroj Lajos Molnár, Julianna Farkas

Mi kaptas la okazon, kaj gratulas al la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo pro la 40-jara jubileo, pro la daŭra kaj persista agado. Kunvenoj de la klubo nuntempe okazas en la unua merkredo de ĉiu ĵaŭdo en la loĝejo de gesinjoroj Molnár.

Szilvási László”

Nome de la „Király Lajos” EAR, pluan longan sukceson por la scienca kaj medicina agado de la nun jubileanta grupo, deziras:

Geedzoj Pásztor nome de la EAR „Király Lajos”.

### 100-jara datreveno de D-ro Ivo Lapenna

En tiu ĉi jaro ni havas rondan datrevenon eĉ de du elstaraj figuroj de l' historio de Esperanto. Unu el ili estas la 150-jara jubileo de L. M. Zamenhof, la alia estas 100-jara datreveno de

naskiĝo de D-ro Ivo Lapenna, konstruinto de l' niaepoka Esperanto-movado, la "heroo de Montevideo".

Lapenna estis longtempa gvidanto de Universala Esperanto-Asocio, kaj havas neforgeseblan meriton pro atingo de la internacia rekono de Esperanto ĉe la asambleo de Unesko en 1954, en Montevideo.

Ivo Lapenna naskiĝis en Split (Dalmatio, Jugoslavio) la 5-an de novembro en 1909 en malnova dalmata, aristokrata familio. Lia vivo estis plene kunligita al la Esperanto-ideo kaj movado.

Li ellernis Esperanton kiel memlernanto en 1928. Li estis kunfondinto de Studenta Esperanto-Klubo (poste Akademia Esperanto-Klubo) en la Universitato de Zagreb en 1929, kaj ĝia prezidanto ĝis aprilo 1941; fondinto de Studenta Tutmonda Esperanto-Ligo (STELO) dum la UK en Budapeŝto en 1929, kaj ĝia prezidanto ĝis la komenciĝo de la Dua Mondmilito; prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo de 1937-1950; komitatano kaj estrarano de IEL (ekde 1947 UEA) de 1938 -1974; ĝenerala sekretario de UEA de 1955-1964; prezidanto de UEA de 1964-1974; fondinto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) en 1957 kaj ekde tiam ĝia prezidanto, iniciatinto kaj dum pluraj jaroj redaktoro de ia organo Internacia Jura Revuo; membro de la Akademio de Esperanto ekde 1952; kunfondinto de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM) en 1980 ekde tiam ĝia prezidanto; membro de la redakta komitato de Horizonte kaj ĝia ĉefa kunlaboranto.

Foto pri Lapenna: [http://www.ivolapenna.org/index/lapenna\\_farve.jpg](http://www.ivolapenna.org/index/lapenna_farve.jpg)

Post lia forpaso la 15-an de decembro en 1987 en Kopenhago, honore al lia agado estis starigitaj du instancoj: "Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna", kaj "Fondaĵo Ivo Lapenna" - kiuj nun instigas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, klubojn kaj individuojn ĉie en la mondo celebri la du gigantojn per multaj ekspozicioj, prelegoj kaj artikoloj en la gazetaro pri ilia enorma, eminenta kaj elstara laboro por la Internacia Lingvo, Esperanto.

Kompleksa materialo pri lia agado, viv-prezento, verkoj, rezultoj, artikoloj, paroloj, ktp. estas kolektita en aparta retejo: <http://www.ivolapenna.org>

Ni invitas vin senpage utiligi la abundan materialon de la retejo. Bonvenon!

Fonto: Ret-Info

<http://www.eventoj.hu>

Reklambildo:  <http://gazetejo.org>



## **NORDHUNGARIA INFORMO**

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: [pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu](mailto:pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu)

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>